




ESPERANTO

FEBRUARO 1962

55 a Jaro - N-ro 675 (2)

esperanto

FEBRUARO 1962

55 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 675 - (2)

Fondinto: H. HODLER

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro: W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 128313. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1962): 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO:

La fama Marvirino en la haveno de Kopenhago, kongresurbo de nia 47a U.K.

Enhavo

La jaro de la elektoj. <i>Lapenna</i>	21
H. C. Andersen-vidindaĵoj. <i>Windeballe</i>	22
Intervjuo kun D-ro Maillard	24
La epoko de kulturaj interŝanĝoj. <i>MacLellan</i>	26
Esperanto en la pola gazetaro	28
Raporto pri esperanta morskodo	30
Elekto de Komitatanoj B	34
La Ora Libro pri la Domo	35

Rubrikoj

La poŝtmarkkolektado	23
Novaj Libroj	32
La Internaciaj Konkursoj	33
La Juna Vivo	35
La filmservo de UEA	36
Ricevitaj libroj	36
Nia Forumo	36
Radio	36
Tra la mondo	37
Esperantista vivo & Nekrologo	38
47a U.K.	38
Oficiala Informilo	39

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

LA JARO DE LA ELEKTOJ

Laŭ la Art. 8 de la Statuto, ĉiuj oficoj en Universala Esperanto-Asocio daŭras tri jarojn. La ofichavantoj estas reelekteblaj. En kazoj de delegitoj, ĉef-delegitoj kaj perantoj plej oportune estas reelekti — respektive nomi — la samajn personojn, kiuj jam spertiĝis en sia laboro. En la intereso de la kontinueco tio eĉ estas dezirinda, kaj en la grandega plimulto de kazoj konsiderata kiel tiel mezevidenta, ke elektoj eĉ ne okazas, sed tute simple la samaj personoj daŭrigas siajn respektivajn funkciojn.

Alie prezentiĝas la afero kiam temas pri la Komitato kaj Estraro de U.E.A. Kiel konate, la Komitato de U.E.A. konsistas el tri kategorioj de komitatanoj: la t.n. komitatanoj A, kiujn elektas la aliĝintaj landaj kaj fakaj organizaĵoj; komitatanoj B, kiujn elektas la ĉef-delegitoj kaj delegitoj, sia-vice reprezentantaj la individuan membraron de U.E.A.; komitatanoj C, kiujn alelektas la komitatanoj A kaj B. kune ĝis kvarono de sia propra nombro, kun la celo havigi al la Asocio la kunlaboron de aparte spertaj personoj, kiuj pro siaj scioj kaj pozicio povas doni valoran helpon al la Asocio. Estas necese akcenti, ke absolute ĉiuj komitatanoj, senkonsidere al la kategorio, estas plene egalaj en siaj rajtoj kaj devoj. Tiamaniere la Komitato de U.E.A. respegulas la strukturon de la Asocio, kiu konsistas el landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj individuaj membroj. La nacia principo, sur kiu estas bazitaj niaj landaj asocioj por pli efike agi sur la nacia kaj loka niveloj, estas esprimita per la komitatanoj A; la internacia principo, laŭ kiu estas organizitaj la fakaj societoj, esprimiĝas en la ebleco por tiuj asocioj reprezentiĝi per siaj komitatanoj A; la universaleca principo reflektiĝas en la institucio de la komitatanoj B kaj C. Unika, plej demokrata kaj tre balancita sistemo, kiu per taŭga kombino de ĉiuj elementoj respegulas la universalecon de U.E.A. en la universaleco de ĝia supera organo, en kies manoj troviĝas la sorto de la Esperantismo.

En la lastaj dek jaroj la nombro de komitatanoj duobliĝis. En la nuna momento la Komitato konsistas el 62 komitatanoj kaj 5 observantoj, kiuj havas ĉiujn rajtojn kiel la komitatanoj kun la escepto de la voĉdona rajto. La konsiderinda nombra kresko de la Komitato estas rezulto de la grandiĝo de la Asocio. Pro la daŭra vastiĝo de la agado de U.E.A. paralele kreskis ankaŭ la respondecoj de la Komitato. Nun la Asocio preskaŭ komplete plenumis la Laborplanon kaj kelkrilate atingis eĉ pli ol estis antaŭvidite. Nova Laborplano estos akceptita en Kopenhago, sed la unua projekto estos publikigita jam en la marta numero de "Esperanto". Gravaj taskoj kaj multe da laboro atendas U.E.A. en la sekvanta periodo.

Ĝuste tial estas necese atingi, ke la supera organo de la Asocio konsistu el personoj kiel eble plej elstaraj, sindonaj, laboremaj, pretaj oferi parton de siaj talento, energio kaj tempo por la bono de la Asocio kaj de la tuta Esperanto-movado. En la pasinteco kelkfoje montriĝis tendencoj elekti iun personon komitatano nur por honorigi lin. Tio estas erara. Se iu meritas honorigojn, oni elektu lin Honora Membro de la loka grupo, landa asocio aŭ eĉ U.E.A., sed ne membro de organo, kies tasko estas reprezenti, fiksi la gvidprincipojn surbaze de la Statuto, labori kaj elekti la Estraron. La nunjaraj elektoj havas apartan gravecon precipe tial, ĉar U.E.A. eniras *novan stadion de sia agado*, en kiu la ĉefa celo estos enkonduki Esperanton en la lernejojn kaj paralele ĉiuflanke vastigi la kampojn de la praktikaj aplikoj. Por konservi la akiritajn poziciojn, atingi multajn novajn, pluroble altigi la nombron de esperantistoj en la mondo, plue fortikigi la Asocion kaj plenumi sennombrajn aliajn taskojn kaj tasketojn, U.E.A. devas havi kiel eble plej kompetentan kaj efikan Komitaton, el kies mezo devos esti elektita kiel eble plej reprezentanta, laborkapabla kaj homogena Estraro.

Pro ĉio ĉi estas vera postulato de la nuna situacio, ke la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj, ĉef-delegitoj kaj delegitoj elektu kiel komitatanojn A kaj B vere la plej taŭgajn personojn, kiuj pro siaj kapabloj, perfekta kono de la movado kaj bezonoj de la Asocio, kiel ankaŭ pro sia preteco plenumi diversajn taskojn, meritas eniri la Komitaton de U.E.A. Tiaj komitatanoj scios ankaŭ elekti pliajn kompetentajn personojn kiel komitatanojn C, tiel ke la Komitato estu el ĉiuj vidpunktoj ĝis maksimumo altnivela. Tio ebligos ankaŭ elekton de tia Estraro, kian bezonas la Asocio en la sekvanta periodo. Necesos ankaŭ atenti al la aĝo de la komitatanoj, tiel ke en ĝi troviĝu ne nur malnovaj laborantoj — kio estas tre utila el vidpunkto de la kontinueco — sed ankaŭ novaj, junaj, freŝaj fortoj.

Kompreneble, la elekto-instancoj havas plenan liberecon elekti kiun ajn ili volas. Ankaŭ la vorton "libereco" ili povas kompreni laŭplaĉe. Neniu rajtas altrudi tiurilate sian opinion. Tamen, sendube estas pli ol dezirinde, ke en la elektado, tute speciale ĉi-jare, oni atentu antaŭ ĉio la interesojn de la Asocio kaj de la movado ĝenerale. Kaj oni bone memoru, ke de tiuj elektoj dependas en la lasta linio la estonteco de la Asocio. Nur plej bona Komitato povos formi plej bonan Estraron. Nur tiaj organoj povos certigi al la Asocio pliajn progresojn kaj al la Internacia Lingvo pliajn sukcesojn.

Prof. D-ro Ivo Lapenna



Hans Christian Andersen

H. C. ANDERSEN-VIDINDAĴOJ

Se oni estas membro de malgranda nacio, oni ne povas atendi, ke multaj samlandanoj atingis tian famon, ke ili estas ĝenerale konataj de homoj en aliaj landoj. Ni danoj ne pensu, ke multaj homoj ekster nia lando konas H. C. Ørsted, Niels Bohr (fizikistoj), Rasmus Rask (lingvisto) aŭ Carl Nielsen (komponisto). Sed unu danon ĉiuj konas, — Hans Christian Andersen, kies fabeloj estas legataj kaj amataj de infanoj kaj plenkreskuloj en la tuta mondo. Tial, kaj ĉar en la venonta somero esperantistoj grandnombre vizitos Danlandon, eble ne malutilus ĉi tie iomete okupiĝi pri la lokoj, kiuj havas rilaton al H. C. Andersen.

Kiam turistoj venas al Odense, ĉefurbo de la insulo Fueno, ili tuj direktas sin al unu el la plej modestaj stratoj de la urbo. La domoj estas malgrandaj kaj malnovaj, sed ĉarmaj kaj pitoreskaj, kaj en unu el ili naskiĝis en 1805 Hans Christian Andersen. Dum la tuta somero tie svarmas homoj el ĉiuj landoj. Kelkaj havas la bonŝancon, ke aperas en sia ruĝa jako la leterportisto de tiu distrikto (hazarde li nomiĝas Andersen), — kaj li verŝajne estas la plej ofte fotografata leterportisto en Danlando.


Ĉar la malgranda domo povis lokigi nur parteton el la objektoj, kiujn oni deziris elmontri, oni en 1930 konstruis novan "memorhalon", kiu kune kun la malnova domo faras ampleksan kaj indan H. C. Andersen-muzeon. En ĝi oni trovas objektojn plej diversajn: manuskriptojn, leterojn, papertondaĵojn, bildojn, meblojn ktp. En la supra etaĝo de la memorhalo estas elmontrataj libroj kun la fabeloj en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Esperantisto, kiu vizitas la muzeon, speciale ĝojas pro ekzemplero de "La Virineto de Maro", donacita al la muzeo de Zamenhof kaj portanta lian propraman dediĉon.

En granda ronda halo belegaj murpentraĵoj prezentas epizodojn el la vivo de H. C. Andersen. Oni vidas la modestan ĉambron, kiu servis kiel loĝejo por la familio kaj laborejo por la patro, kiu estis ŝuisto. Alia bildo montras H. C. Andersen, kiam li kiel nur 14-jara knabo forlasis sian naskiĝurbon por vojaĝi al Kopenhago kaj tie fariĝi fama aktoro. "Oni devas unue trapasi terure multajn malbonaĵojn, kaj post tio oni estas fama", estis lia naiva konvinko. Sur la lasta bildo oni vidas, ke oni honoris en Odense la 62-jaran fabeliston per torĉa procesio, dum el ĉiuj fenestroj brilis la lumoj. Je tiu okazo plenumiĝis, kion maljuna virino en Odense profetis al la knabo: ke iam Odense honoros lin per iluminado.

Se oni volas enprofundiĝi en la memorojn pri




Kie loĝis H. C. Andersen dum sia infanaĝo: 3 Munkemøllestræde



H. C. Andersen foriras el Odense, 1819

H. C. Andersen, oni nepre vizitu ankaŭ la modestan domon, kien transloĝis la familio, kiam la knabeto havis nur du jarojn. Tabulo en la muro rakontas, ke "al ĉi tiu domo ligas sin la plej karaj infanmemoroj de la verkisto". Ankaŭ en tiu domo estas muzeo, tamen kun nur malmultaj memorigaĵoj, sed kun des pli da eblecoj por fantazio: jen sidis la patro rakontante al la knabo fabelojn ("Li rakontis al mi fabelojn, tiel ke mi mem fariĝis rakontisto"), — jen en la korto malantaŭ la domo sidis la knabo sub la grosarbedo, dum horoj revante, — kaj jen ekstere sur la strato la aliaj infanoj mokis la altaĉan, malbelan Hans Christian, kiu preferis ludi per siaj pupoj kaj ludteatro, dume revante pri brila kariero kiel aktoro.

Se H. C. Andersen estus knabo en nia tempo, li eble estus lernanto de tiu, kiu skribas ĉi tiujn liniojn. Pardonu, se mi tro multe fantazias, — sed almenaŭ mi ĉiutage instruas infanojn, kiuj loĝas en la stratoj kun la du "Andersen-domoj", ĉar tiuj stratoj apartenas al la distrikto de "mia" lernejo. H. C. Andersen vizitis lernejon por infanoj de malriĉuloj, kaj la domo, kie tiu lernejo havis lokon, estas ankoraŭ videbla, — malnova trabara konstruaĵo. Tuj proksime strateto kondukas al iama



Torĉluma procesio por Andersen, Odense, 1867

lavloko ĉe la rivereto. Jen la virinoj siatempe alvenis por lavi la tolaĵojn. Andersen skribas pri tio en la kortuŝa fabelo "Ŝi ne taŭgis".

Entute la rivereto, kiu serpentumas tra Odense kaj prezentas ĉarmajn kaj idiliajn lokojn, ludis gravan rolon en la fantazio de la knabo, kio evidentiĝas en pluraj fabeloj.

En Kopenhago estas videbla la domo, kie loĝis Andersen dum multaj jaroj. Ĝi estas trovebla en la strato Nyhavn (strato nun iom malbonfama) ĉe la numero 20. Sed multan tempon li estis for, ĉu dum vojaĝoj en eksterlando, ĉu vizitante grandbienojn dise en la lando.

Lia tombo troviĝas en Kopenhago (Assistens Kirkegård), kie mortis en 1875 la genia, stranga fabelverkisto.

Esperinde multaj partoprenantoj en la 47-a U.K. uzos la okazon viziti la lokojn, ĉi tie priskribitajn. Feliĉe la intereso pri Andersen kaj liaj fabeloj estas granda. Tio atestas, ke la bono kaj belo ankoraŭ havas lokon en homaj koroj.

Erling Windeballe

LA POŝTMARKKOLEKTADO EN 1961

La alsendo de poŝtmarkoj okazas konstante, kun preskaŭ sama kvanto kaj kvalito. Per relative malmulte da kontribuintoj, kompare kun la nombro de membroj, ni atingis ĝis novjaro 1961 la sumon de 10.000 steloj egalvalore kun 2500 guldenoj. Malnovaj kontribuintoj ĉesis sendi, novaj alvenis. Ni instigas al kontribuintoj reveni, al kontribuantoj daŭrigi, kaj ni bonvenigas kontribuantojn. Kiel kutime alvenis en la daŭro de la jaro dudeko da sendaĵoj sen nomo de sendinto aŭ kun la adreso nelegebla. Tiuj sendoj ja eniras la statistikon, sed eble la sendintoj vane atendis konfirman leteron. Ni instigas al la kongresanoj por U.K. 1962 konservi kaj kunporti siajn uzitajn poŝtmarkojn.

La dek plej fervoraj kolektantoj en 1962 estis:

S-ino Mary Hodge, 8 Tennyson Street, Medindie, Aŭstralio.

S-ino Rita Aagaard, 34 Sherbourne Road, Mt. Eden S. I., Auckland, Novzelando.

S-ro M. H. Wayside, Westcliffe Road, Birkdale, Southport, Anglujo.

S-ro Leo Jolliet, Assmannshaüser Str. 8 a, Wiesbaden, Germanujo.

S-ro Conrad Fisher, 808 Steward Street, Meadville, Pennsylvania, Usono.

S-ro Heinrich Wielgus, Elise-Averdirch Str. 34, Hamborg-Borgfeld, Germanujo.

S-ro Leif Heilberg, 1801 Page Street, San Francisco 17, Kalifornio, Usono.

S-ino W. Pkalska, Poniatowskiego 1, Tonin, Pollando.

S-ro Antonio J. Pereira, Rua Francisco Assis Pupo 591, Campinas (SP), Brazilo.

S-ro C. M. Cather, Lymington Road 45, Torquay, S. Devon, Anglujo.

Premioj estas senditaj. Senkompare s-ino Mary Hodge ankaŭ en pasinta jaro sendis plej multajn poŝtmarkojn. Sendu daŭre al.

*Peter Zacho, Randbølvej 4, 1. s.
Kopenhago F.*

Intervjuo

kun

D-ro Maillard



1. Kara d-ro Maillard, se mi ne eraras vi estas 85-jara, kaj vi eklernis Esperanton en 1891, t.e. antaŭ sepdek jaroj. Jen vera vivtempo dediĉita al Esperanto! Sed ne nur tio; vi ankaŭ estis unu el la 688 esperantistoj, kiuj ĉeestis la Unuan Kongreson en Bulonjo, 1905. Ĉu vi povas memori viajn impresojn pri tiu historia okazaĵo? Kiel vi sentis vin dum tiu Unua Kongreso?

I. Jes mi estas 85-jara. Mi naskiĝis dum Oktobro 1876 en unu urbeto "Sceaux" (pr. So) situanta en la suda Pariza regiono. Mi eklernis Esperanton en 1892, ne en 1891 kiel vi supozis. La dato 1891 estis erare presita en la nomaron de "Veterana Esperantista Klubo". Mi skribis al M. Lewin por korektigi tiun eraron. Efektive mi esperantistiĝis en Oktobro 1892. La sama eraro estis farita pri P. Nylen, kiu eklernis Esperanton ne en 1891 sed kiel mi en 1892. Li mem skribis tion en sia memor-libro "50 jarojn kun P. Nylen" p. 9. Kaj Strönné en sia antaŭparolo al tiu libro skribis: en la jaro 1892, P. Nylen fariĝis esperantisto. Mi skribis tiujn verajn datojn en artikoleto pri la plej malnovaj esperantistoj, kiu estis publikigita en "Esperanto" 1957 p. 81.

Dum 1902 mi faris esperantajn kursojn en Sceaux kaj mi starigis en tiu urbeto unu esperantistan Grupon. En 1905 kun sep membroj de la Grupo mi ĉeestis la Unuan Esperantistan Universalan Kongreson en "Boulogne-sur-Mer". Kion diri pri miaj impresoj dum tiu historia fakto? Ili estis samaj kiel tiuj de la tuta ĉeestantaro. Mi estis emociita ĝis larmoj, precipe kiam Zamenhof eniris sur la scenejon (ĉar tiu unua kunsido de la kongreso okazis en la urba teatro) kaj kiam li komencis sian neforgeseblan paroladon, la unuan kiun li parolis antaŭ granda publiko. En ĉi-tiu momento mi revidas lin, mi aŭdas lian voĉon elparolantan tiujn vortojn, kiuj restis gravuritaj en la fundo de mia menso: "Mi salutas vin, karaj gesamideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tut-

monda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj por frate premi al si reciproke la manojn je la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas...."

Mi ne volas plue diri koncerne la kongreson mem, ĉar ĉio estas dirita pri tiu fama internacia kongreso "la unua sen interpretistoj". Sed unu alia okazaĵo, kiu treege impresis min dum unu kunsido de tiu kongreso, estis kiam unu junulo 15-jara petis permeson paroli pri la "Disvastigado de Esperanto inter gejunuloj". Li parolis tiel flue, tiel simple, tiel klare ke Esperanto ŝajnis esti lia gepatra lingvo! Li diris: "varbi maljunulojn estas vane labori, ĉar ili ĉiuj baldaŭ mortos kaj estos perditaj por nia afero. Sed ni devas labori en la radiko kaj varbi tiujn, kiuj morgaŭ estos siavice plenaĝuloj kaj havos infanojn, kiujn ili instruos pri Esperanto". Li ricevis longajn aplaŭdojn. Jes ja tiu junulo, kies nomo estas Ed. Privat, estis jam granda Oratoro!

Inter aliaj fortaj impresoj dum tiu unua kongreso, mia admiro al tiu junulo restadis en mia menso. Ŝajnis ke mi jam vidis en li, tiam tiel juna, unu el la estontaj gvidantoj de nia Movado.

Alia memoraĵo ligita kun la Bulonja Kongreso estas tiu-ĉi: En la plej grava medicina franca Revuo "La Presse Médicale" aperis artikolo pri tiu kongreso. Tuj mi sendis al la aŭtoro kelkajn pliajn informojn, kaj mi nomis tiun kongreson: *Kongreso de nun Historia*. Tio estis presita en la Revuo. Sed en mia letero mi estis aldoninta: "Unu tago venos kiam la nomo de Zamenhof estos gravurita sur platojn en la stratoj kaj placoj en la tuta Mondo. Oni starigos, honore al li, statuojn en ĉiuj grandaj urboj". Sed verŝajne tio ŝajnis iom troa ĉar tiu frazeto ne estis presita.

2. Dum via longa vivo vi vidis multajn ŝanĝojn en nia movado. Kiuj, laŭ via opinio, estas la plej grandaj ŝanĝoj en Esperantujo dum tiu tempo?

II. Mi ne aludos kelkajn okazaĵojn tamen sufiĉe gravajn, kiuj okazis en Francujo dum la komenco

de tiu jarcento. Mi parolos nur pri la ĝenerala Movado sur la internacia kampo.

Ŝajnas ke oni povas konsideri tri epokojn. Ĝis la unua Mondmilito la Movado disvastiĝis ĉefe en la intelektaj medioj: scienculoj, lingvistoj, altoficiroj, kuracistoj, kelkaj universitatanoj, k.t.p. Post la unua Mondmilito, la popolaj tavoloj komencis interesiĝi pri Esperanto, speciale ekde 1920-25. Tiu nova evoluo de nia Movado iom post iom plivastiĝis en multajn landojn ĝis la nuna epoko kies ĉefa karaktero estas la eniĝado de Esperanto en la lernejojn kaj en la mediojn de la Junularo. Tiu tria epoko vere komenciĝis post la dua Mondmilito kaj ĝi plivastiĝis speciale dum la du lastaj jaroj. Tiu tria epoko estas promesplena kaj jam aperas la antaŭsignoj de la venonta Venko.

3. *Kiaj estas viaj impresoj pri la nuntempa movado?*

III. Do miaj impresoj estas tre optimismaj. Esperanto venkis unujn post la aliajn ĉiujn malhelpaĵojn starigitajn de Antaŭjuĝoj kaj Nescio kontraŭ ĝian nereteneblan marŝadon antaŭen. Ekde nun, nenio povos ĝin haltigi, krom gravegaj politikaj cirkonstancoj.

4. *Kiel multaj aliaj samideanoj, vi dediĉis vivtempon al disvastigo de nia afero. Ĉu vi povas diri, kio vin ĉefe ligis al Esperanto dum tiel multaj jaroj?*

IV. Kion plej forte ligis min al Esperanto? Mi malfacile povas klarigi tion al mi mem. Fakte pluraj faktoroj agis sur mian menson. Ekde mia unua kontakto mi profunde sentis ke Esperanto estas eksterordinara eltrovaĵo. Mi entuziasmiĝis kaj mi ne komprenis pro kio miaj kunlernantoj ne sentis kiel mi. Kaj la kontraŭargumentoj de miaj profesoroj, tamen kleregaj homoj, ne konvinkis min. Mi estis certa ke mi pravus, ĉar mi konsciis ke ili parolas pri aĵo, kiun ili tute ne konis, kaj eĉ kiun ili ne volis koni, mi ne komprenis pro kio. Tiu sento ke la atakoj kontraŭ Esperanto venis ĉiam de personoj kiuj volis nenion scii pri ĝi, pli fortigis mian fidon al Esperanto kaj al D-ro Zamenhof.

Tiam mi sciis malmulte pri Zamenhof kaj pri la lingvo. En 1892 estis nek kursoj nek grupoj. Miaj unuaj instruistoj ne estis homoj sed nur du libroj, unue la "Langue Universelle Esperanto" de Zamenhof, tradukita de De Beaufront (1892), kaj tuj poste la "Kondukanto Internacia" de Grabowski. Sed pli kaj pli mi lernadis per tiuj libretoj, pli kaj pli mi komprenis la mirindan lertecon de Zamenhof, kiu sukcesis fari tiun tiel facilan lingvon. Mi ĝin komparis kun la latina, la greka kaj la germana lingvoj, kiujn oni devigis min lernadi dum tiu tempo. Tiuj lingvoj ŝajnis al mi teruraj monstroj. Kaj mi jam pripensis ke nun dank'al Esperanto ĉiuj Homoj sur la terglobo havas eblecon por interkompreniĝi sen studadi la latinan, grekan, germanan aŭ aliajn lingvojn.

Jen estas, mi opinias, la tri faktoroj kiuj plej ligis min al nia Movado.

5. *Vi estas tro modesta por mencii tion, sed kelkaj personoj scias, ke vi donacis konsiderindajn monsumojn por subteni la movadon, tute precipe la junularan movadon, en Francujo kaj internacie. Evidente vi alte taksas la laboron kaj gravecon de nia juna generacio. Ĉu vi havas iun mesaĝon por viaj junaj samideanoj?*

V. Efektive koncerne la disvastigon de nia Movado mi, ekde pluraj jaroj, estas konvinkita ke nun oni devas zorgadi, ne nur al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, sed ankaŭ por interesi al la internacia Lingvo la gejunulojn kiuj, finintaj siajn lernadojn en la lernejoj, iĝis metilernantoj aŭ studentoj, kaj kiuj grupiĝas en klubojn aŭ Societojn por sportoj aŭ kulturaj aferoj.

Tie estas nun bonega grundo por propagandi Esperanton. La Gejunuloj havas ardon kaj entuziasmon necesajn por grandaj intelektaj Movadoj. Per Esperanto oni povas eltiri ilin el la politikaj Partioj kaj el Sektoj, fontoj de malamoj kaj de akraj bataloj, kaj gvidi ilin al pli bela celo, tiu de interhelpado kaj de amikeco inter ĉiuj popoloj. Tie, kaj nur tie, estas nun la solvo de la grandaj internaciaj malamikecoj kiuj povas konduki la tutan Homaron al ĝia pereco.

Ĉu ne ŝajnas stultaj tiuj Sektarismoj kiuj pretendas labori por la bono de la Homoj, mortigante kaj enkarcerigante milionojn da ili, — kompare kun la bela, pura, idealo de Zamenhof, la interhoma Frateco?

"Karaj junaj gesamideanoj, kiuj jam venis al ni, kaj kiuj certe ne bedaŭras vian aliĝon, mi alvokas vin. Helpu al ni por allogi al nia Movado viajn kungrupanojn, amikojn kaj kamaradojn, montrante la multajn aĵojn kiujn ili povos koni dank'al Esperanto per facilaj kaj ĝojaj vojaĝoj al fremdaj landoj, kaj precipe ke ili povas kontaktiĝi senpere kun multaj aliaj homoj, kiuj ofte fariĝos veraj amikoj en la tuta Mondo. Se, ekde nun, multe da junuloj eklernus Esperanton, tre baldaŭ ĉiuj povus interkompreniĝi. Kontraŭe la plej granda parto de plenkreskuloj, kiuj ankoraŭ ne komprenis la belecon kaj la utilecon de nia Movado, baldaŭ ŝajnos subevoluintaj homoj.

"Gejunuloj, nun prenu en viaj manojn la Torĉon, flamigu la Mondon per la sanktaj Flamoj de interhoma Amo, kaj se viaj emoj instigas vin al vojaĝoj en landojn kie vivas popoloj subevoluintaj, imitu la ekzemplojn de Tibor Sekelj aŭ de D-ro Schweitzer, kaj aliaj kuraĝaj esploristoj aŭ kuracistoj.

"Ne plu temas pri koloniismo sed simple pri homa frateco, pri frateca helpado al kompatindaj gentoj. Nun Frateco devas "descendi" de altaj Monumentoj, sur kiuj ĝi pompas flanke de Libereco kaj de Egaleco, ĝis en la korojn de Homoj.

Agante tiel, vi iĝos indaj idoj de la profunda penso de Zamenhof."

LA EPOKO DE KULTURAJ INTERŜANĜOJ

La argumento por organizado kaj kunordigado de kulturaj aktivecoj je internacia nivelo, kaj pledo por subteno flanke de societoj kiujn koncernas tiu ĉi problemo.

de William MacLellan

La plej urĝa problemo, kiu devos esti alfrontita kaj dum terure mallonga tempo solvita se, kiel raso, ni ne estu reduktitaj al atoma cindraĵo, estas la jena: kiel rapide efektiviĝi reciproke komprenejon inter la nacioj. La Esperanto-Movado, ekde la fruaj tagoj de sia fondinto, estas motivita de la idealo, plifaciligi al la nacioj la interŝanĝon de respektivaj kulturaj valoroj pere de komuna lingvo, sekve povas esti utile pripensi, kiamaniere tiun ĉi apartan aspekton de kultura interŝanĝado oni povus vastigi por inkluzivi ankaŭ aliajn artojn de komuniko kaj esprimi, kiuj terenas ekster la regiono de la vortoj.

Dum la pasinta duonjarcento, de kiam la koncepto de d-ro Zamenhof pri Internacia Lingvo por la unua fojo ardigis la fantazon de malgrandaj homgrupoj en ĉiuj mondpartoj, vere rimarkinda tutmonda movado estas starigita, kiu transcendas ĉiujn diversaĵojn de lando, klaso, kredo, kiuj disigas la mondon en la nuna epoko. Ĝi malsimilas la ŝtatajn klopodojn unuigi la mondon pere de la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj tiel, ke ĝi estas popola movado kreskanta el individuoj kaj grupoj en ĉiuj landoj. Kontraste, O.U.N. prezentas bildon de la anarkio, kiu efektive dinamigas la homan aktivecon. Ĉiu unuopa nacio tie kunveninta vorte subtenas la idealon de unueco, amikeco kaj paco, sed fare ni rimarkas malmulton krom la Pra-Adamo, kiun ni konas tiel intime, obstine protektanta sian propran intereson kaj sekurecon, ne grave je kioma kosto al aliaj.

Cetere, la trarapida progreso de teĥnologio perturbis la malrapidecon kutime donitan por psiĥologiaj ŝanĝoj, kaj nukleaj armaĵoj plimalpli arĥaigis la antikvajn penskutimojn, tiel malnovajn kiel la homo kaj ties animalecaj antaŭuloj, kiuj pro neceso en malamika ĉirkaŭaĵo starigis sekurecon kiel la etikon de la tagaltaga individua ekzisto.

La militema sinteno, bazita sur la timo, kiu fontas el priokupateco pri persona sekuro, ne plu estas terura, ĉar influas ankaŭ pli granda timo — timo pri ekstermiĝo. Granda liberigo de homa energio ĝis nun direktita al sekuro de la individuo, nun ŝajnas ebla, se ni nur povus trovi rimedon por formeti la timoplenajn penskutimojn, pro kiuj niaj agoj respondas neadekvate al la ŝanĝigantaj cirkonstancoj de niaj vivoj.

Kiel ni povas uzatingi tiun ĉi novan rezervujon

de energio kaj direkti ĝin al solvado de la hereda malperfektaĵo de egoismo en la homaj nacioj, kiu estas la fundamenta kaŭzo de niaj disecoj, antaŭjuĝoj kaj timoj, kiuj kreis la nuntempan mond-situacion?

D-ro Zamenhof volis fondi religion, kiu unuigus la mondon, kaj indikis la fundamentajn veraĵojn, la "eternan ideon" komunan al ĉiuj religiaj dogmoj kaj institucioj.

Pro sia naturo mem, tamen, la ortodoksa religieco estas disiga laŭkaraktere; ni devas do serĉi aliloke la magian filozofŝtonon, kiu el la straso de homaj disecoj kreos oran unuecon de celo.

La unika aspekto de homa aktiveco, ĉe kiu ĉiuj nacioj renkontiĝas sur komuna tereno, troviĝas ĉe la artoj. La reciproka partopreno ĉe la distingaj koloroj de muziko, pentrado, dramo, dancado, poezio kaj literaturo renkontas similan respondon en la koroj de ĉiuj popoloj, kaj sekve ŝajnas racie, kuraĝigi klopodojn direktatajn al pligrandigo de la kvanto de kultura interŝanĝado, ĉar tio estas la plej potenca rimedo havebla al ni por enjungi la vere kreaĵojn de la homaro al la kampanjo por la paco kaj al nuligo de la plej ekstremaj kaŭzoj de malfido en la mondo.

Tiurilate la Esperanto-Movado povas plenumi gravan taskon, ĉar ĝi estas tutmonda organizaĵo, kies anoj estas dediĉitaj, ne nur al disvastigo de la mondlingvo, sed ankaŭ al plivastigo de reciproka interkompreniĝo, kio estas finfine la fina celo de la vortoj.

Iuj modernaj lingvistoj komencas dubi, ĉu fakte la lingvoj evoluis unuavice kiel komunikiloj. La atestaĵo ŝajnas indiki iun internan devigon kaj neceson en la individuo, kiu postulas esprimkapablan formon, kaj pro tio la parolon oni kreis. Ĉiuj, kiuj verkas ion kun literatura valoro, certe konscias, ke tia klopodo estas grandparte procedo de sinklarigo kaj rivelas al ni tiun submergitan 85% de niaj mensprocedoj, kiun oni malprecize kaj nesufiĉe nomas la subkonscion.

La rilata analogio pri Esperanto ŝajnas, ke tiu lingvo evoluas en epoko, kiam la mondo sentas bezonon sin esprimi per komuna voĉo kaj tiel eltrovi la naturon de la homa spirito komuna al la tuta homaro. Estas signife, ke Zamenhof estis poeto, kaj la origino de la lingvo, kiun li elpensis, fontis el la agonio de disecoj kaj reciproka malamo, kiuj disŝiris la multnacion Centran Eŭropon de

lia epoko.

En ĉiuj liaj skribaĵoj aŭdiĝas tiu elkora kanto, kiu pledas por ĉesigo de naciaj antaŭjuĝoj kaj konstruado de la unuiginta mondo heredita de "homaranismo".

Ni aŭdas la saman alvokon kantatan de la poetoj de multaj landoj verkantaj en Esperanto hodiaŭ. La ekbriloj de homaro ekkonscia pri siaj vastaj sociaj procedoj kaj meĥanismoj evidentiĝas en iliaj verkoj, sed la poezio sola, ankoraŭ ligita al la lingvobarilo, certe povas utiligi la helpon de la fratinaj artoj por tiu ĉi grandega tasko.

Jam venis tempo por esperantistoj, kiuj interesiĝas pri aferoj ekster la kampo de lingvo rilate al mondkulturo, kunlabori kun aliaj agantoj, kiuj strebas al unueco per kulturaj klopodoj je la popola nivelo de artistoj kaj spektantoj. La formado de tiaj grupoj, kia la "Internacia Arta Teatro", estas signifa indikilo, kaj estus interese, ekzemple, vidi evoluigon de tiu teatra laboro ĝis Danc-Dramo kaj eksperimentaj teatraĵoj, kiuj utiligus vortojn kaj movojn kune, kaj tiel komencus la procedon derompi la barilon inter vorto kaj ago, kaj prezentus al diversnaciaj spektantoj la komunan lingvon de mimiko, gestoj, movoj kaj danco, kiu kapablas emfazi preter vortoj niajn homajn similecojn.

Koncerne la aliajn artojn de muziko kaj pentrado, kie lingvo koncerniĝas nur je la nivelo de recenzado, esperantistoj povus konsideri kunlaboradon kun tiaj organizaĵoj, kia la lastatempe fondita Internacia Oficejo por Kulturaj Interŝanĝoj, kiu, kiel sugestas la nomo, ekzistas por plibonigi la rimedojn haveblajn al artistoj por libere vojaĝi de unu lando al alia kiel kulturaj kaj internaciaj ambasadoroj por siaj respektivaj landoj. Ne estas sufiĉe vaste konate de tiuj, kiuj staras ekster la artismaj profesioj, ĝuste kiel malfacila trovas la artistoj la prezentadon eksterlande kaj la aŭdigon, vidigon aŭ eĉ diskutigon de siaj kreaĵoj.

La registaroj konstatas la prestiĝvaloron de kulturaj prezentadoj en eksterlando, kaj aranĝas interŝanĝkonsentojn rilate artistojn kun aliaj landoj, sed tio havas tre limigitan disvastigon kaj koncernas nur kelkajn elstarajn artistojn kaj grupojn, kaj estas malfacile antaŭvidi la evoluon de tiaj oficialaj aranĝoj je tia rapideco kaj grandeco, kia estas nun bezonata.

La ideon pri fondado de Internacia Oficejo por Kulturaj Interŝanĝoj sugestis origine organizaĵo skota nomata la "Dunedin Society", kiun koncernas la evoluigo de la skotaj artoj, unuavice de la muziko. Oni spertis grandajn malfacilaĵojn pro la manko de aparte skota registaro, kiu povus helpi la prezentadon de artistoj en Skotlando mem kaj la aranĝadon de prezentadoj en eksterlando. Estis tamen eble, trovi artistojn en aliaj landoj, kiuj havis similajn malfacilaĵojn kaj volis vojaĝi kun la celo spertiĝi, kaj spektantarojn oni pli facile trovis en la respektivaj landoj por ekster-

landaj artistoj, sekve la interŝanĝideo radikiĝis. La unua aranĝo okazis inter skota kaj dana pianistoj, kaj poste polaj, hungaraj kaj ĉeĥaj interŝanĝoj estis aranĝitaj, kaj por la venonta sezono germanaj, usonaj kaj rusaj muzikistoj estas organizataj.

Oni jam pritraktas tiajn fundamentajn problemojn, kiuj malhelpas la liberan fluon de artistaj talentoj, kiaj: la kvota sistemo por reguligi la alvenon de eksterlandaj artistoj, kiuj eble konkuris malfavore al la enlanda artisto; la interŝanĝado de mono kaj la pagado de honorarioj per neeksportebila mono; nekomercaj prezentkondiĉoj por helpi la junan talentan artiston, kiu ankoraŭ ne tute sin establis.

Oni intencas starigi Monŝanĝejon por artistoj, kaj kompili katalogon pri artistoj kaj grupoj en la diversaj landoj ligitaj al la Oficejo, kiuj pretas vojaĝi al alilandaj urboj.

Estas urĝe bezonate je la nuna stadio de la evoluo de la Oficejo, ke aliaj landoj estu persvaditaj starigi naciajn centrojn de la I.O.K.I. similajn al la Skota Centro jam starigita. Nur per kreado de kerno de homoj en ĉiu lando interesitaj por trovi lokajn artistojn vojaĝemajn kaj kapablajn ankaŭ organizi aŭskultantarojn por aŭskulti la alilandan artiston en la koncerna interŝanĝo, povas efektiviĝi funkcia monda sistemo de kultura interŝanĝo.

Esperantistoj povus ludi gravan rolon je la nuna stadio de la evoluo de la Oficejo per eltrovado de la artistoj kaj artamantoj, kiuj eble interesiĝus pri la I.O.K.I., kaj kontaktigo kun la Internacia Sekretario: William MacLellan, 240 Hope Street, Glasgow, Skotlando.

Alian gravan servon oni povus fari per aranĝado de aparta seminario pri Kulturaj Interŝanĝoj en la kadro de la 47a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. Krom la granda laboro de UNESKO, kiu emas esti oficiale inspirita je registara nivelo, ne ekzistas fokusa punkto al kiu mondaĵ kulturaj problemoj povas esti direktataj kaj diskutataj je nivelo de specialistaj civitanoj.

La Fina Detenilo kontraŭ la milito ne estas rakedoj al la luno, sed reciproka kompreniĝo, kaj la nacioj devus elspezi siajn riĉaĵojn por ĉiu rimedo, kiu pliŝtatigas kaj pliestimigas en la okuloj de aliaj iliajn artistojn kaj kulturajn atingojn.

Kiam la klimaton de mondpolitiko kolorigos pli neformala publika kaj registara opinio, kaj se la reciprokaj suspektoj vekitaj de konkuraj ekonomiaj interesoj povas esti kvietigitaj, tiam oni povos ekkonkeri la batalemon, kaj nobla epoko malfermiĝos al la homaro dum la mizeron kaj malriĉecon de tiom multaj vivoj forigos edukado kaj teknologio. En la pli granda lukso kaj libertempo de la estonteco oni povos varti la artojn kaj gracojn de la vivo, kiuj estas pli proksimaj al la alta ĉelo desegnita de la Kreado por la organisma vivprocedo, kiun nia raso havas la privilegion heredi.

ESPERANTO EN LA POLA GAZETARO

Ne ofte oni renkontas informojn en la esperantaj gazetoj pri artikoloj, informoj, kursoj esperantaj k.t.p. en la pola gazetaro. Iu povus ekpensi, ke certe polaj gazetoj informas pri esperanto tre malofte, des pli, se li enrigardus en la tabelon pri la informa laboro en 1960, publikigita en "Esperanto-Revuo" n-ro 7-8/61, kie la nombro de gazetartikoloj en Pollando estas nur 58 kaj de la informoj 830.

Efektive en la pola gazetaro en la jaro 1960 aperis multe pli da artikoloj, informoj k.a. pri Esperanto, ol tio estis montrita en la statistiko. La informo en "Esperanto-Revuo" estas nekompleta kaj grave malgrandigita.*)

Nur en la ĵurnalo "Ilustrowany Kurier Polski" en urbo Bydgoszcz, en la jaro 1930 aperis 341 artikoloj kaj informoj pri esperantaj temoj. Krom tiuj, la sama gazeto aperigis 140-foje la t. n. komunan rubrikon "Esperanto", en kiu estis publikigitaj 321 informoj. Oni povas diri, ke la rubriko "Esperanto" aperadis pli malpli en ĉiu dua numero de la gazeto. Inter ili troviĝis: 4 artikoloj kun kvarkolonaj titoloj, 11 trikolonaj, 39 dukolonaj. (IKP posedas 5 kolonojn). En 1960 la sama ĵurnalo aperigis 15 fotojn pri esperantaj temoj kaj unu krucenigmon kun solvo: "Ni lernu Esperanton".

En la jaro 1959 (44-a U.K.) la sama gazeto aperigis 612 artikolojn kaj informojn, kaj en 1958 la nombro de tiuj ne estis malplimulta.

Laŭ la oficiala bulteno de la Ŝtata Kolport-Entrepreno RUCH por la jaro 1961, en Pollando aperas entute 371 diversspecaj periodaĵoj, el kiuj 52 ĵurnaloj, 80 semajnaj gazetoj, revuoj k.t.p. Konsiderante nur tiujn ĉi du poziciojn, oni povas konstati, ke en multaj el ili aperas almenaŭ kelkfoje (pojare) diversaj artikoloj, informoj, fotoj pri esperanta temo, aŭ simple pri Esperanto. Mi substrekas, ke inter tiuj periodaĵoj estas gravaj politikaj, sciencaj, kulturaj k.s. organoj, en kiuj aperas ankaŭ tre gravaj artikoloj pri Esperanto. Mi citas nur kelkajn: "Przegląd Kulturalny" (Kultura Trarigardo), "Nowa Kultura" (Nova Kulturo), "Polityka" (Politiko), "Świat" (La Mondo), "Doo-

koła Świata" (Ĉirkaŭ la Mondon), "Fakty i Myśli" (Faktoj kaj Pensoj), "Kulisy" (Kuliso, ilustrita magazino), "Żołnierz Polski" (Soldato Pola), "Głos Nauczycielski" (Instruista Voĉo), "Nowa Wieś" (Nova Vilaĝo), "Radio i Telewizja" (Radio kaj Televido) k.a., kaj krom tiuj, multaj gravaj ĉiutagaj gazetoj, ekz-e "Trybuna Ludu" (Tribuno de l'Popolo), "Życie Warszawy" (Varsovia Vivo) k.t.p., eĉ katolikaj gazetoj, kiuj publikigas ne nur artikolojn aŭ informojn, sed verajn artikolegojn pri Esperanto. Neunufoje la artikoloj en tiuj ĉi gazetoj estas seriozaj sciencaj disputoj pri Esperanto. De tempo al tempo okazas, ke iu ĵurnalisto skribas artikolon kontraŭ Esperanto. Tiuokaze, ĝi estas la vera proverba "bastono en formikejo". Tuj kaptas la plumon aliaj publicistoj, kaj ankaŭ sciencistoj kaj komenciĝas tre interesa interartikola batalo, dum kiu ĉiam venkas la esperantista flanko. Tiel okazas, ke en Pollando tiaj kontraŭesperantaj gazetartikoloj estas iuspeca bona propagando de Esperanto, ĉar tiamaniere kreskas ekinteresiĝo de la legantaro pri Esperanto kaj kaŭzas t.n. "movon en intereso". La kontraŭuloj falas sub batoj de la sciencistoj-esperantistoj, kaj la legantaro ĉiam pli kaj pli ekscias pri Esperanto. Tiel do, la kontraŭuloj eĉ ne konscias, ke ili ĝuste atingas tute alian celon, ol ili intencis. Ili helpas nevole al disvolviĝo de Esperanto.

Jen kelkaj ekzemploj s. t. "Esperanto en la pola gazetaro": *Ilustrowany Kurier Polski*, Bydgoszcz-Koszalin, 5, 6/7.8.61; art. de prof. Jan Smykowski s. t. "Islando kaj ĝia poeto", kun foto de s-no Baldur Ragnarsson. La aŭtoro donis koncizan geografian kaj historian priskribon pri Islando kaj vaste montris al la legantaro, faman poeton-esperantiston Baldur Ragnarsson. Surbaze de la libro "Ŝtupoj sen nomo", kaj ankaŭ de "Esperanta Antologio" de William Auld, estis priparolita la arto de la verkisto en esperanta poezio el la poetika vidpunkto, kaj ankaŭ cititaj gravaj elparoloj de J. Régulo Pérez, eminenta eseisto, esperantisto kaj kritikisto, konekse kun la ragnarssona poezio. Finkonkludante, prof. J. Smykowski demandas:

"Kaj pripensu, ĉu sen la lingvo internacia, la granda poeto de la malgranda nacio povus fariĝi egale facile propraĵo de ĉiuj popoloj en la tuta mondo?"

Nowa Kultura, 22.10.61, Warszawa; grava kaj granda semajna gazeto. Artikolo s. t. "Esperanto

*) La informo ne estas "malgrandigita". La Informa Fakto de U.E.A. kunmetas la Statistikan Trarigardon surbaze de la informoj ricevita de la landaj I. F. resp. landaj asocioj, inkluzive la polan. Se la informo estis malĝusta, la protesto devas esti direktita al tiuj, kiuj liveris ĝin, nome al P.E.A.

I. F. de U.E.A.

en lernejo aŭ kontraŭ nematuriĝinta kritiko" de d-ro Zenon Klemensiewicz, profesoro en Jagiellona Universitato en Krakowo, eminenta sciencisto, aŭtoritatulo en lingvaj problemoj, ankaŭ bonega esperantisto, kiu frakasmaniere respondis la artikolon de A. Ziemilski en "Zycie Warszawy" de 23.2.1961, s. t. "Esperanto en lernejo aŭ kontraŭ devoj naivaj", kaj ankaŭ de 6.4.61 "Pri Esperanto — respondo". Prof. d-ro Z. Klemensiewicz sciencmaniere kontraŭbatis la sensencaĵojn de A. Ziemilski, kaj eĉ pli sed tralegu mem la finon de la responda artikolo :

"Andrzej Ziemilski difinas pozitivan sintenon al Esperanto en lernejo kiel naivecon. Se oni konsideros, ke UNESKO favoras Esperanton, ke inter agantaj adeptoj de Esperanto troviĝas multaj eminentaj sciencistoj, kaj el niaj (polaj — J.S.), eĉ se por ekzemplo, prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj, prof. d-ro Tadeusz Kotarbiński ("Miaflanke mi povas nur certigi vin, ke demandite pri mia opinio, mi ĉiam donos mian plenan apogon al la internacia lingvo"; el intervjuo por "La Verda Vojo", n-ro 2.3.1958) do verŝajne tia naiveco la malhonoron ne alportas, kaj kontraŭ la tromemfideco de ignorado gardas".

En la sama n-ro de "Nowa Kultura" aperis granda rubriko : "Kursoj de Esperanto".

Polityka, 11.10.61; same grava kaj granda semajna gazeto. Art. en la rubriko : "Civitanoj, ne balbutu" s. t. "Parolas Varsovio" de J. Gajewski, J. Klimek. Jen fragmento :

"Ŝajnas, ke Esperanto en nia (pola — J.S.) radio meritas agnoskon, bone ludas la rolon de poleco kaj progreso. Ŝajnas, ke Esperanto ĝenerale bone trapasas la ekzamenon kiel rimedo por la vasta interkompreniĝo inter homoj de diversa nacieco, por interŝanĝo de informoj kaj opinioj, kaj sekve de tio, ĝi servas al interproksimiĝo, kunlaboro kaj kulturaj interrilatoj inter la popoloj".

Nowa Wieś, 22.10.61, Warszawa; granda, riĉe ilustrita, multkolora semajna revuo por vilaĝa junularo. Art. de Tadeusz Chudy s. t. "Unu mondo, lingvo, mono" (esperantlingve). La aŭtoro vaste informas pri valoroj kaj bezono de Esperanto, ĝiaj organizaĵoj, apliko en ĉiutaga vivo kaj interpopolaj rilatoj. Li informas ankaŭ ke, 23-24.9.1961 okazis en Varsovio en la Domo de l'Vilaĝano renkontiĝo de tiuj ĉi legantoj, kiuj dank' al la gazeto "Nowa Wieś" fariĝis jam esperantistoj. ("Nowa Wieś" jam delonge publikigas esperantajn lecionojn). La renkontiĝo estis organizita komune de : Asocio de l'Vilaĝa Junularo, PEJ kaj la redakcio de la semajna revuo "Nowa Wieś". Estis fondita Junulara-Esperanto-Klubo ĉe la redakcio de "Nowa Wieś" kaj elektita estraro de la klubo. Dum la kunveno oni preparolis multajn gravajn aferojn, inter ili : embarasoj, kunligitaj kun esperantaj lernolibroj; projekto de estradaj spektakloj en la esperanta kaj pola lingvoj; peto al Pola Radio : disaŭdigi esperantajn kantetojn kaj dua — (simila)

al Pola Entrepreno de Surdiskigoj : ni atendas multajn gramofondiskojn kun esperantaj kantoj; organizado de E-kursoj ĉe Popoluniversitatoj k.a. Samtempe oni decidis, ke la revuo "Nowa Wieś" publikigos daŭre denove la lecionojn de E-kurso, kies gvidantino kaj verkistino estas s-anino Maria Niemirow. (La lecionojn oni jam publikigas — aperis jam 3-a leciono).

Fakty i Myśli, 16-30.11.61, Bydgoszcz; dusemajna gazeto, organo de la Ligo de Ateistoj kaj Liberpensuloj, publikigas E-lecionojn (leciono 2); aŭtoro : d-ro Walery Więcko. Oni povas nur bedaŭri, ke la redakcio uzas la helpliteron "h", anstataŭ la signeto superlitera. Kvankam ĝi estas permesita, tamen ni jam elkreskis el la komenca periodo de Esperanto, kaj la helplitero "h" anstataŭ superlitera signo ŝajnas al ni jam iomete nekonvena, precipe por konstantaj lecionoj en gazeto.

Radio i Telewizja, 20-26.11.61; semajna, parte ilustrita revuo kun radia kaj televida horarprogramo, Warszawa. Art. sur la ĉefa loko s. t. "Parolas Varsovio, naskiĝurbo de Esperanto", kun bonegaj fotoj de la redaktoroj kaj helpantoj dum la laboro en E-fako de Pola Radio. La artikolo okaze de la alproksimiĝanta datreveno de la milfoja esperanta brodkasto de Pola Radio. Varmajn gratulojn kaj bondezirojn el la tuta mondo al niaj varsoviaj radio-laborantoj!! Supozeble mankos neniu esperantisto kun siaj gratuloj !

Gazeta Robotnicza; ĵurnalo; Wrocław, 24.11.61; art. "La libro pri Malsupra Silezio ĉirkaŭkuris la tutan mondon". Ĉi tie estas dirite pri granda ekinteresiĝo en la tuta mondo, kiun elvokis la libro en Esperanto, eldonita en Vroclavo s. t. "Malsupra Silezio hieraŭ kaj hodiaŭ".

Słowo Polskie; ĵurnalo; Wrocław, 11.11.61. Pli granda informo s. t. "Jugoslavia astronomo prelegos en Esperanto". Temas pri la prelegoj de prof. Popović el Sarajevo.

Ĉi supraj ekzemploj estas nur ereto en la tuto de fruktodona, poresperanta informado, helpe de gazetaraj komunikoj, artikoloj k.t.p. en la pola gazetaro. Eĉ el tiuj kelkaj ekzemploj oni povas jam orientiĝi, kiel grandan rolon ludas redaktoroj-esperantistoj kaj ĉiuj ĉi, kiuj helpas presigi aŭ verkas gazetartikolojn pri Esperanto.

Tial ne estas mirinde, ke "Ilustrowany Kurier Polski" tiel favoras al Esperanto kaj ke ĝi tiom multe publikigas E-artikolojn se en la redakcio sidas kiel ĉefsekretario, nia eminenta, jam veterana, oferema kaj malgraŭ sia 41-jara poresperanta laboro, ĉiam treege vigla samideano, redaktoro Kazimierz Małycha.. Nur dank' al li, Esperanto ennestiĝis en la pola nacia gazeto "Ilustrowany Kurier Polski", kiel en la propra nesto.

Konkludo : Ĉiam pli kaj pli da redaktoroj-esperantistoj en redakcioj de naciaj gazetoj !

Atenton ! Atentigu la redaktorojn-esperantistojn en naciaj gazetoj !
Jan Smykalski

RAPORTO PRI ESPERANTA MORSKODO

de C. J. McMullen

En la maja eldono de la revuo 'Esperanto', ni presis leteron de S-ro McMullen, kiu petis proponojn pri Esperanta Morsa Kodo. Jen raporto, kiu estas rezulto de la korespondado. La kodo en tio ne estas konstatita, sed tiuj, kiuj uzas morskodon, ĉu maristoj, skoltoj, radioamatoroj aŭ fervojistoj, uzu ĝin por provi, kaj sendu viajn komentojn al :

*Subleŭtenanto C. J. McMullen,
H.M.S. WOTTON,
c/o G.P.O. Londono.*



Sajnas ke ne estas oficiala kodo, kvankam ekzistas neoficiala, kiun mi priskribos.

2. Kelke da korespondantoj sendis al mi ĉi tiun kodon. Ĝi simple uzas por la supersignitaj literoj du partajn signojn kun 'h'; ekzemple, anstataŭ 'ĉ', oni sendas 'c-h', k.t.p. Dum Esperanto estas tiel malmulte uzata, kiel nuntempe, ĉi tiu estas unu solvo. Se oni sendas telegramon, oni devas por la telegramsendisto skribi 'c-h' por 'ĉ', ĉar ne ekzistas konstatataj esperantaj morssignoj. Kaj li transsendos 'c-h' per radio aŭ kablo. Sed certe ni esperas al pli bona situacio ol ĉi tio. Por la estonteco, ĉi tiu metodo ne estas tre bona propagando, ĉar ŝajnos ke Esperanto estas ligita al naciaj lingvoj. Interesas, eble, noti ke nur anglaparolantoj subtenis la h-metodon.

3. Mi ricevis multe da proponataj kodoj, kiuj havas specialajn signojn por la supersignitaj literoj. Iuj el ĉi tiuj kodoj distribuas la neuzatajn signojn, enhavante la nuntempajn q, w, x kaj y. Ankaŭ, iuj subtenis la uzadon, kiun mi komence proponis (iom senkonsidere), de la rusaj ekvivalentoj. Se ni rigardas la rusan morskodon, pri kiu mi sciiĝis dank' al "Wireless World", "Iliffe" elektra eldonaĵoj, ni vidas ke por la litero, kies Esperanta traduko estas 'v', oni uzas la hodiaŭan 'w', por ĵ:v; por ĥ:h; por ĉ: neuzatan signon; por ŝc:q; por ŝ: la jam ekzistantan 'ch'.

4. Sed kian rolon nia nova kodo devas plenumi? Estas necese povi transsendi ion ajn el Esperanta verkaĵo, en kiu oni eble trovas la literojn q, w, x aŭ y aŭ iajn supersignojn sur literoj el

latinida aboco. Oni neniam trovas tute fremdajn literojn el la rusa aŭ, ekzemple la malaja aboco, ĉar nomoj el tiaj lingvoj estas ĉiam tradukitaj Esperanten. Se ni havus signojn por ĉiuj literoj el lingvoj, kiuj uzas baze la latinidan abocon, estus tro malfacile por lerni. Ni trovu kompromison, sed iuokaze, ni konservu la signojn por q, w, x kaj y, pro la supre menciitaj kialoj.

5. Kiel, do, ni elektos signojn por niaj sole Esperantaj literoj? Ni konsideru lingvon, kiu havas la samajn problemojn kiel Esperanto, nome lingvon, kiu uzas la latinidan abocon kun kelke da supersignitaj konsonantoj. Unu korespondanto, S-ro Stojnić de Vrŝas, Jugoslavio, bonkore sendis al mi la serbo-kroatan morskodon; parenteze, mia korespondanto estis la ĉefa kreanto de ĉi tiu kodo. Ĝi uzas por la simplaj literoj, la kutimajn signojn, sed ankaŭ ĝi havas signojn por la ekvivalentoj de ĉ, ĝ, ĵ kaj ŝ, krom iuj neutilaj literoj. S-ro Stojnić proponis, kiel la plejmulto de korespondantoj, uzi por 'ŭ' kaj 'ĥ', la jam ekzistantajn 'u' kaj 'ch' (laŭ ĝia germana uzado).

6. Konsiderinte ĉiujn proponojn, mi opiniigis jene: ni havu du alternativajn metodojn de morsa komunkado, nome:

(a) Por uzi:

- (1) kiam unu aŭ alia komunikanto ne konas kodon (b);
- (2) kiam estas interulo neesperantista (t.e. por telegramoj kaj mesaĝoj per intersendejoj k.a.);
- (3) kiam estas dubo.

La kodo: la jam ekzistanta "internacia" morskodo, uzante 'c-h', 'g-h', 'h-h', 'j-h', 's-h' kaj 'u' anstataŭ ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ, respektive.

kaj (b) Por uzi:

- (1) kiam kaj sendanto kaj ricevanto konas ĝin;
- (2) por praktiko;
- (3) por propagando.

Esperendas ke la uzado de ĉi tiu kresku, kaj la uzado de la h-metodo malkresku. Ĝia konstruado estas per la serbo-kroata kodo, kiel antaŭe menciita, por la utilaj literoj, kiuj ne enhavas ĥ kaj ŭ, kiuj estas konstruitaj laŭ la hodiaŭa "internacia"

morskodo. La specialan signon por supersignoj oni sendas post la simpla litero kiel aparta signo. Ekzemploj de okazoj kiam oni uzus ĝin estas jene :

kun 'a' por à, á, ã, â, ä kaj aliaj
 kun 'c' por ç, ć k.a.
 kun 'l' por ł
 kun 'n' por ñ k.a.
 kun 'o' por ø, ö, ô k.a.

kaj multaj aliaj, sed ne por Esperantaj literoj. La kodo (kiun oni nomu "La Esperanta Morskodo") :

A.—	G—.	K—.	S...
B—...	Ĝ—...	L.—...	Ŝ—...
C—.	H....	M—	T—
Ĉ—.	Ĥ—.	N—.	U..—
D—..	I..	O—	Ŭ..—
E.	J.—	P.—	V...—
F..—	Ĵ—.	R.—.	Z—...
Q—.	W.—	X—.	Y—.

Supersignoj k.c. : . — . —
 Numeroj :

1 . — — — —	6 —
2 . . — — —	7 — — . . .
3 . . . — —	8 — — — . .
4 —	9 — — — — .
5	0 — — — — —

Specialaj signoj :

Finis . — . — . Eraris (pli ol sep)
 Resendu . . — — . . . Atendu . — . . .
 Interrompo — . . . —

Por eviti troan lernendaĵon, la jenajn mallongigojn mi proponas por interpunkcio. Oni sendas ĉi tiujn kiel apartajn literojn, aŭ la literoj formus apartajn vortojn. Alternative, interpunkciajn signojn oni rajtas literi; ekzemple, komo estas sendbla kiel 'km' aŭ 'komo', k.t.p.

PT	Punkto (.)
KM	Komo aŭ decimala signo (,)
PT PT	Dupunkto (:)
PT KM	Punktokomo (;)
CS	Unuobla cita signo aŭ apostrofo (')
CS CS	Duobla cita signo (")
CS PT	Ekkria signo (!)
SK	Oblikva streko (/)
DS	Demanda signo (?)
PZ	Parentezo ()
KT	Kunigstreketo (-)
PF	Nova paragrafo

(sekvata de paragrafa numero, se necese)

Fine, mi deziras, ke oni notu por kiam estos necese pensi pri semaforo, ke por unuformeco kaj facileco, la interpunkciaj mallongigoj estu samaj kiel supre. Sed jen alia temo, kiun mi lasas por alia persono elpensi.



Kantis kaj dancis junaj esperantistoj el Kansai, Japanujo, kiuj partoprenis la unuan 'Aŭtunan Festivalon' de KLEG, Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj, en la 14-15a, oktobro, 1961, apud Lago Biwa.

Novaj Libroj

Duope ricevatajn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

ĈINA ANTOLOGIO 1949-1959*. Kun antaŭparolo de Maŭ Dun, Prezidanto de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj. Tradukis el la ĉina lingvo S. J. Zee, Pandiŝo, Censinio, Yang Yong-sen, Laŭlum, I.Ko, Honfan. Lingve kontrolis Ĉ. Ĉen kaj S. J. Zee. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio, 1960. 416 p. 23,5 × 15,5 cm. 13 bildoj. Prezo: 7 gld., 28 st. Bindita.

Ĉiu homo havas celon en la vivo. Eĉ idioto celas nutri kaj distri sin. Cinikuloj diras, ke la homo vivas nur por si mem, sed tio estas efektive malofte tute vera. Homo ja vivas parte por si mem, sed preskaŭ ĉiu dediĉas sian vivon ankaŭ al aliaj celoj: al siaj infanoj, sia amato aŭ amatino, sia edzo aŭ edzino, kaj sia familio, al iu religio, partio, urbo, lando, okupo, sporto aŭ intereso. Kelkaj, nur malmultaj, dediĉas sin al la realigo de iu ideo utila al la tuta homa socio.

El ĉiuj eblaj celoj, al kiuj la homo povas dediĉi sin, la noveloj kaj poemoj de la Ĉina Antologio 1949-1959 konsideras sindediĉon al la ĉina komunista partio, ruĝa armeo kaj socio la solaj efektive gravaj celoj de la vivo. Preskaŭ ĉiu novelo kaj poemo temas pri la sukcesa lukto de la kolektivisma sento kontraŭ la individua egoismo.

En tiu limigita kampo la rakontoj tamen estas surprize diversaj. La unua el ili okazas ekster Ĉinio kaj lerte kondukas la leganton for de eŭropa medio al la ĉina sceno pere de ĉina maristo sur pola ŝipo "Internacia Amikeco", kiu renkontas grekon kaj malajon, kiŭ ankaŭ nostalgias al siaj hejmlandoj. Post tiu unua novelo ĉiu el la 17 noveloj kaj 3 skizoj rakontas pri Ĉinio mem. Tri temas pri la milito kontraŭ japanoj, unu pri la milito kontraŭ kuomintanganoj, unu pri la korea milito, du pri naci-malplimultoj en Ĉinio, kvin pri industria produktado, ses pri anoj de agrikulturaj kooperativoj kaj pluraj pri interhelpejo kaj kuraĝo. Nuraj priskriboj de pejzaĝoj kaj medioj estas malmultaj; la rakontoj rapide moviĝas.

La 21 poemoj estas similaj; mallongaj kaj viglaj. El ili sep prikantas la lukton forigi la kuomintanganojn, du temas pri la korea milito, tri estas patriotaj kantoj, unu komparas la malnovan socion kun la nova, ses priskribas industriajn kaj produktajn pro-

gresojn, du estas amkantoj.

La amo al aliaj homoj, eĉ amo inter du samseksulinoj, estas atentata, sed amo al la socio aŭ la partio estas la amo, kiu estas pli grava kaj kiu venkas. Tiu amo estas tiel fanatika, ke en unu novelo patrino malsatigas sian infanon prefere ol ne pagi sian kotizon al la partio, kaj en alia novelo patrino savas kudromaŝinon anstataŭ sian fileton, ĉar ŝi opinias la kudromaŝinon pli valora al la socio.

Apoteozo de la patriotismo kaj la kolektivismo, la Ĉina Antologio estas certe la plej impona el ĉiuj postmilitaj literaturaj verkoj komunismaj en nia lingvo. Klarstile verkita kaj bone presita sur bonkvalita papero, ĝi ne nur servos kiel misiisto por prediki sian moralan instruon en malproksimaj landoj, sed ĝi rajte prenos sian lokon inter aliajn naciajn antologiojn en Esperanto, kvankam ĝia enhavo spegulas nur dek jarojn da ĉina literaturo.

Lingvaj mankoj estas malmultaj:

kelkaj preseraroj, plurfoja ellaso de pronomo subjekto, "returnita" anstataŭ "remetita", "injekciaĵoj" anstataŭ "injektaĵoj", "mi ne decidis plori plu" anstataŭ "al mi ne decidis plori plu", frazeroj de la speco "la en nebulo kaŝitan Anglan Markolon", "sur ŝia pala pro timo vizaĝo".

Kelkaj vortoj (ekzoceto, he-ho-ulino, hahahaheis, procelario, k.a.) ne estas klarigitaj en la cetere bonega listo de klarigoj, kiu formas malgrandan enciklopedion pri ĉinaj aferoj en la fino de la libro. Gang Lin (p. 393) devus esti sur p. 395.

Lingvaj rimarkindaĵoj estas uzo de "vi" anstataŭ "oni" en unu loko, "gakado" (anserblekado), "publikis", "publikitaj", imperativo post "esperi", "sekvmomente", "ŝultro ĉe ŝultro" p. 305 sed "ŝultron ĉe ŝultro" p. 307, "mi ŝtele palpebris en la vilaĝon", "kiel eble" (p. 331). La formo "Allah" estas uzita anstataŭ la pli prononcebla "Alaho". Al "kadro" estas donita nova plia difino (gvidanta funkciulo), kiu certe kelkfoje kaŭzas konfuzon. Estas bedaŭrinde, ke oni ne enkondukis la pli logikan kaj etimologie pli taŭgan formon "kadrano".

Memorindaj proverboj estas "Oni trovas ĉiam brilon, rigardante propran filon", "eĉ se tranĉiloj pluvus el la ĉielo", "Kial mi timas mian propran korbataĉon?", "Ne gravas, kies estas la virbovo, la bovido ĉiam estas mia", "Se troviĝas du malsaĝuloj en la mondo, mi estas unu el ili; se nur unu en la mondo mi estas tiu unusola".

Edward Ockey



Tibor Sekelj: "Ajnu ceremonio"

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1961

Stato je la 31-a de decembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2860	3265	114,16
2.	Finnlando	2515	2525	100,40
3.	Italujo	4247	4253	100,14
4.	Britujo	6688	6661	99,60
5.	Svislando	2120	2103	99,20
6.	Hispanujo	2585	2557	98,92
7.	Usono	3660	3610	98,63
8.	Svedujo	6325	6190	97,87
9.	Danlando	3002	2876	95,80
10.	Germanujo	7490	7085	94,59
11.	Belgujo	2121	2006	94,58
12.	Francujo	7516	6754	89,86
13.	Nederlando	5716	4942	86,46
14.	Norvegujo	1993	1677	84,14
15.	Brazilo	5100	4142	81,22
16.	Jugoslavio	7150	5560	77,76

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Nov-Zelando	965	1184	122,69
2.	Israelo	250	285	114,—
3.	Kanado	665	746	112,18
4.	Aŭstralio	1146	1148	100,17
5.	Madagaskaro	250	248	99,20
6.	Portugalujo	535	515	96,26
7.	Aŭstrujo	1580	1440	91,14
8.	Islando	250	205	82,—
9.	Urugvajo	250	165	66,—
10.	Argentino	960	505	52,60
11.	Sudafriko	375	175	46,67

Grandan surprizon la rezulto de tiuj ĉi konkursoj jam ne donas, ĉar ambaŭ venkintoj troviĝas ĉe la pinto jam ekde la somero kaj firme tenis sin tie!

Tute specialan gratulon ni direktas al Japanujo, kiu fariĝis venkinto la trian sinsekvan fojon. Tiu fakto estas tiel malofta, ke nur unufoje pli frue ĝi estis atingita, siatempe, de Brazilo, en la tempo kiam tie la movado grandioze floris.

Kiam Japanujo venkis en 1959 la unuan fojon, ĝi havis kvoton de 1150 kaj atingis 2470 poentojn. Ĉijare, kun kvoto de 2860 ĝi atingis 3265 poentojn, kiuj ciferoj montras vere grandegan kreskon en la lando, kiu preparas la 50-an Universalan Kongreson de Esperanto. Kun granda fido ni rigardas la estontecon de la japana movado. Ni varme esperas ke la brila ekzemplo de Japanujo estu forta instigo por ĉiuj landoj kiuj ĉifoje ne atingis 100%

de sia kvoto, kaj eble precipe por Brazilo, kiu iam atingis la saman gloron, dum ĝi nun okupas modestan lokon.

Malfeliĉa pro sia loko certe estas Jugoslavio, ĉar ĝin kaŭzis tute specialaj valutaj cirkonstancoj, pro kiuj la kotizoj devis multe altiĝi. Ni fidas tamen, ke la granda plimulto de niaj tieaj membroj retrovos la eblecon pagi la kotizon, tiel ke la lando povu restarigi sian antaŭe ĉiam dignan pozicion en la konkursoj.

Varme gratulinda estas ankaŭ Nov-Zelando, venkinto en la Dua Konkurso. Ĝi atingis la belan rezulton de 122,69%. Ni kore dankas al la varbintoj en tiu lando, precipe al kelkaj energiuloj en la landa asocio. En la Dua Konkurso tre bone figuras ankaŭ Israelo kaj Kanado kun resp. 114% kaj 112,18%, sur la dua kaj tria lokoj. Tiuj ciferoj estas promesplenaj por la venonta jaro kaj certe estas kuraĝigaj por strebado al la unua loko!

La fakto, ke multaj landoj ne atingis 100% de sia kvoto estas malpli maltrankviliga ol ĝi ŝajnas. Ĉefe kaŭzas tion la cirkonstanco ke, pro la tiam anoncita kotizaltigo por 1961, en la fino de 1960 multaj membroj altigis sian membrokategorion al tiu de dumviva membro. Tio grave influis la poentnombrojn de la koncernaj landoj kaj sekve ankaŭ iliajn kvotojn por 1961. Atingi la saman nombron da poentoj sen akiro de nekutime multaj dumvivaj membroj efektive estis iom malfacile. Sed tio signifas ke de ĉiuj landoj nun restintaj sub 100% ni atendas en 1962 novan salton supren, preter la kvotoj!

De ambaŭ venkintaj landoj la perantoj ricevos kiel kutime, je dispono libropremion en valoro de po 100.— n.gld. (400 steloj), por disdivido aŭ lotumo inter la kunlaborintoj en la sukceso.

La Novaj Konkursoj

Ankaŭ en 1962 la konkursoj okazos laŭ la sama sistemo. La atingita nombro da poentoj en la fino de 1961 estas la kvoto por 1962, kun minimumo de 250. En Konkurso I partoprenas la landoj kun pli forta, en Konkurso II tiuj kun malpli forta movado. La poentoj estas donataj laŭ jenaj valoroj: AM = 1 poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt; MA kaj J-MA = 10 pt; MS = 15 pt; Pat. kaj DM = 50 pt.

Kun fido je niaj senlacaj ĉefdelegitoj kaj perantoj ni aliras la novan jaron. Varbu energie kaj ne forgesu varbi ankaŭ dumvivajn membrojn kaj patronojn!

Grandan sukceson al ĉiuj deziras

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ELEKTO DE KOMITATANOJ B SPECIALA ATENTIGO AL ĈEFDELEGITOJ KAJ DELEGITOJ

Kiel menciite en la ĉefartikolo, la jaro 1962 estas la jaro de la elektoj de komitatoj A, B kaj C. Ilia mandato komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Kopenhago.

Laŭ la Statuto (art. 25b) kaj la Ĝenerala Regularo (art. 28) je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro 1961 estas elektata po unu komitatano B. Sekve, en tiu ĉi jaro la ĉefdelegitoj kaj delegitoj rajtas elekti 6 komitatanojn B.

Laŭ art. 28 b de la Ĝenerala Regularo, la ĉefdelegitoj kaj delegitoj per tio ĉi estas invititaj fari proponojn pri la kandidatoj. Kvin ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne la vicdelegitoj aŭ fakdelegitoj) rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. Ni atentigas, ke laŭ art. 30 de la Ĝenerala Regularo (vidu p. 145 de la septembra numero 1960 de la revuo Esperanto) kandidato devas esti membro-abonanto de UEA almenaŭ dum la lastaj tri jaroj, do minimume ekde januaro 1959. Por la bona funkciado de la asociaj laboroj

estas necese elekti kiel komitatanojn personojn kiuj kutimas veni al la Universalaj Kongresoj, kiuj pretas oferi kongresajn plezurojn por sidi en kunvenoj, kiuj konas la laborojn de la Asocio (regule amplekse raportatajn en la Dua Parto de la Jarlibro) kaj ĝiajn Statuton kaj Regularojn (aperintajn en la Unua Parto de la Jarlibro 1959).

La proponoj pri la kandidatoj, kun ilia skriba konsento pri la kandidatigo kaj, se eble, kun detaloj pri iliaj persono, kvalitoj, pozicio en la movado, pozicio ekster la movado ktp., devos atingi la Centran Oficejon de UEA je la nova adreso *Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando*, plej malfrue la 31-an de marto 1962. Proponoj, kiuj ne estos subskribitaj de 5 ĉefdelegitoj aŭ delegitoj, aŭ kiuj ne enhavos la skriban konsenton de la kandidato, aŭ atingos la Centran Oficejon post la menciita dato, ne povos esti prenitaj en konsideron.

En la elektoj de komitatanoj B esprimiĝas la deziroj de la individuaj membroj de UEA. Uzu vian rajton kaj baldaŭ ensendu viajn proponojn. Nepre agu laŭ la supraj preskriboj, por ke via propono estu valida!

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

GRAVA PROJEKTO EN USONAJ LERNEJOJ



En Kalifornio oni komencos instrui fremdan lingvon devige en elementaj lernejoj en 1963 kaj nun preparas la leĝon kiu citos la ĝustan lingvon — laŭ nunaj planoj tio estos hispana lingvo. Ni devas impresi la guberniinstancojn pri Esperanto.

En Februaro okazos en San Mateo (proksime al San Francisco) kunsido de Nord-Kaliforniaj Esperantistoj por granda programo antaŭ la publiko por infanoj, gepatroj, instruistoj, kaj eminentaj edukistoj de la Kalifornia Edukado Administracio. Stelulino de tiu programo estos F-ino Joŝiko Kaĵno de Japanujo.

Partoprenos en tiu programo ankaŭ infanoj el la 3 lernejoj en San Mateo kiuj jam komencis lerni Esperanton. Tiuj infanoj ankaŭ estas agemaj en UNESKO-klubo por Junuloj! kaj partoprenis UNESKO-radian programon.

Lastjare S-ro Harold Darby, Lernejestro, inaŭguris Esp. klason en Sunnybrae Lernejo, instruitan de F-ino Lavina Parsons. Ĉijare en Turnbull Lernejo, Lernejestro, S-ro Philip Vandor starigis kurson por infanoj en la 5a grado,

instruitan de S-ino Humi Hiraki; kaj ĉe Lawrence Lernejo, D-ro Edwin Feldman, lernejestro, mem instruas 31 geknabojn. (Vidu D-ron Feldman en la foto kun 35 el la geknaboj).

Ĉefestro de ĉiuj 24 elementaj lernejoj en San Mateo, D-ro John Andes, entuziasme favoras kaj subtenas la instruadon de Esperanto sed la publiko ĝis nun ne sufiĉe scias pri la afero.

D-ro Feldman penas aranĝi vojaĝon por Esp. instruistoj (10—15 instruistoj en San Mateo) al la kongreso en Kopenhago. La celo estas ke ili partoprenos la Cseh-seminaron, la kunvenon de ILEI, viziti en multaj landoj por interdiskuti kun instruistoj de Esperanto. La planoj estas en embria stato sed progresas kaj via subteno de la granda ekspozicio en San Mateo en Februaro multe helpos (vidu la anoncon). Bonvolu sendi salutojn, libretojn, ktp., al D-ro Feldman. Lawrence School, San Mateo, Calif., USA.



La 18an de decembro 1962, Ĉeĥoslovakio eldonis sian unuan poŝtmarkon kun esperanta teksto. Ĝi estas unu el 11 pm., eldonitaj por propagandi la tutmondan ekspozicion de poŝtmarkoj, Prago 1962. Ĝi havas valoron de 2 Kčs, kaj montras novan fandfornejon je la nomo de K. Gottwald en Ostrava-Kunčice. Ĝiaj koloroj estas griznigra sur brunflava fono.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.

KONKLUDOJ DE LA 5-a INTERNACIA SEMINARIO DE GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

(27-12-1961 — 2-1-1962 en Köln)

Post aŭdo de la prelegoj pri la jura kaj politika aspektoj de kunekzistado; pri la bazaj konceptoj de ŝtato kaj juro; pri la diferencoj inter la soveta kaj usona ekonomiaj sistemoj kaj pri la soveta programo atingi kaj superi la ekonomian produktadon de Usono, kiel ankaŭ post ĝenerala ampleksa diskuto pri la temoj, la Seminario formulas jenajn konkludojn :

- 1) La ekzisto de universala internacia juro estas rekonita ne nur de Usono kaj Soveta Unio, sed de ĉiuj ŝtatoj. Tio ebligas la juran reguligon de iliaj reciprokaj rilatoj.
- 2) Kunekzistado ne estas jura principo, sed necesa premiso por ekzistado kaj funkciado de la internacia juro.
- 3) Kunekzistado estas historia fakto ekestinta jam longe antaŭ ol la slogano estis lanĉita el Soveta Unio, efektive jam ekde tiu momento, kiam kreiĝis la unuaj homkomunaĵoj kiel apartaj sociaj grupoj akirintaj poste ŝtatan karakteron.
- 4) Kunekzistado, kiel ĝi estas komprenata en la okcidenta mondo aŭ formulita en la Programo de la Komunista Partio de Soveta

Unio aŭ formulita de la Beograda Konferenco de Eksterblokaj Ŝtatoj, malgraŭ la diferencoj akcesoraj, estas salutinda en sia esenco, kondiĉe ke la proklamitaj formuloj estu sincere kaj vaste aplikataj en la praktiko. Tia kunekzistado sur ŝtata nivelo devus reflektiĝi je konsiderinda vastigo de ĉiaspecaj kontaktoj inter la ordinaraĵoj homoj, ekde la plej simplaj turismaj rilatoj ĝis tiuj de artistoj, verkistoj, sciencistoj kaj aliaj kulturaj agantoj, ĉio-ĉi sen interveno de la ŝtato, en plena libereco.

- 5) La diferencoj en la ekonomiaj, sociaj kaj politikaj sistemoj, la malsameco en la jura organizo kaj konceptado de la ŝtato kaj juro ne estas malhelpo al kunekzistado de la ŝtatoj kaj ankoraŭ malpli al monde internacia kunlaborado de unuopuloj kaj privataj organizaĵoj, kondiĉe ke la ŝtatoj, precipe tiuj, kiuj vaste propagandas la ideon de kunekzistado, per diversaj metodoj de rektaj malpermesoj ĝis vizaj kaj devizaj obstakloj — ne malhelpu aŭ eĉ malebligu tiun kunlaboradon, kiu povas nur antaŭenigi la interesojn de ĉiu unuopa popolo kaj akceli la bonfarton kaj progreson de la tuta homaro.

LA ORA LIBRO PRI LA DOMO

Kun granda ĝojo ni povis lastmomente ankoraŭ komuniki en la januara numero de "Esperanto", en kiu aperis mia artikolo pri "La nova domo de U.E.A.", ke jam envenis la unua donaco de 5000.— guldenoj kaj ke laŭ peto de la donacinto, S-ino Dorothy Henderson en King (Kanado), unu ĉambro en la domo ricevos la nomon "Kanada Ĉambro".

Ne en tiu ĉi, sed en venonta numero vi legos detalojn pri tiu donaco. Mi — kaj la tuta Estraro — esperas, ke tiu ĉi bonega komenco de la kampanjo pri financaj rimedoj por la nova domo kaj nomoj por ĝiaj ĉambroj estu ekzemplo por aliaj, ĉu individuoj aŭ organizaĵoj, kaj ke fine tiel ĉiuj 15 ĉambroj en la domo havu nomojn.

Sed la Estraro certe ne forgesis nek forgesos tiujn karajn kaj fidelajn anojn, al kiuj ne eblas donaci 5000.— gld, sed kies nomoj estos enskribitaj en "La ora libro pri la domo" pro donacoj de minimume 50.— gld por ĝia instalado. Jam dum la Kongreso en Harrogate venis la unua donaco, nome de nia fidela membrino F-ino L. Fried en Kopenhago. Kortuŝa estis ŝia tuja ago. Baldaŭ poste venis la kontribuo de S-ro N. G. Nilsson en Göteborg (Svedujo) kaj sekvis ĝin la kontribuoj de S-ro Teo Jung kaj de nia notario, S-ro H. J. Bessem en

Enschede (Nederlando). Kvankam kelkaj el la supraj donacoj jam estas menciitaj en la Oficiala Informilo de la gazeto, mi tamen ilin denove memorigas. Tiuj donacintoj donis al vi kaj al mi la ekzemplon. Pro tio mi ilin, ankoraŭfoje, speciale dankas.

Sed, membroj de U.E.A., mi certe neniel riproĉu al vi... ĉar mi mem ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne sendis mian parton! Sed nun, verkante tiun ĉi artikolon, mi prenas mian poŝteklibron kaj sendas mian kontribuon. Certe do por vi ne estos tro malfrue agi same, kiam vi legos tiujn ĉi liniojn. Ni ĉiuj kontribuu por la nova domo, por ke ni sentu ĝin nia propra! Por pliaj informoj mi vin atentigas pri mia artikolo en la januara numero de "Esperanto", speciale ankaŭ koncerne la eblecon donaci por la instalado kaj ilaro de la domo.

Hodiaŭ nur ĉi tiu mallonga artikolo. Mi esperas ke en la estontaj numeroj de "Esperanto" aperos multaj nomoj de kontribuantoj, plenigontaj la Oran libron de NIA domo.

E. J. Woessink,

Estrarano pri financoj

Post diversaj intertraktoj mi estas komisiita provi prizorgi la filmservon de UEA. Por tiu laboro mi havas iom grandan intereson, sed intereso kaj kapablo ne ĉiam estas kongruantaj. Tial ni devas atendi kaj vidi, kion alportos la estonto en tiu ĉi kampo. La tasko estas distribui, ne produkti, filmojn.

Dum mia cerbumado pri la plej bona maniero, ataki la problemon, mi pensis, ke unuavice oni devas scii, kie kaj kiaj esperantaj filmoj ekzistas por luado.

Mi havas promeson de la antaŭa prizorganto de la filmservo, ke li informos min pri la ĝisnunaĵoj de la filmservo. Ĝis nun mi ne posedas tiujn informojn, sed mi pensas, ke kiaj ajn ili estos, mi povas esprimi la jenan peton al interesiĝintaj esperantistoj: Bonvolu informi min pri ekzistantaj esperantaj filmoj kun mencio de titolo, temo, longo en minutoj, larĝo, nigre-blanka aŭ kolora, magneta aŭ fotografa sonstrio, kondiĉoj de luado, mal-longa resumo de la enhavo, ktp.

Se kaj kiam mi estos trovinta ĉ. 25 kunlaborantojn, mi eventuale iom regule per cirkulero informos ilin pri la stato de la filmservo. Povas esti, ke oni post kelka tempo povus fari liston pri lueblaj filmoj.

Do, viaj alskriboj estas bonvenaj. Sed mi anticipu petas indulgon pro eventuala atendo de respondo: ne mankas al mi esperanta laboro. Adresu: S-ro Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V, Svedujo.

Stefo Urban: NOVA EZOPO. Antaŭparolo de Poul Thorsen. Ilustraĵoj de Jaromír Skrivánek. Stafeto: Beletraj kajeroj, 9. J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1961. 128p. 19 × 12 cm. Prezo: 1 usona dolaro.

H. A. de Hoog, D. B. Gregor, K. Kalocsay, S. La Colla, I. Lapenna, T. Nakamura ("Teruo Mikami"), T. Pump, J. Régulo, R. Schwartz, E. Sonnenfeld, G. Waringhien: LA ZAMENHOFA ESPERANTO. SIMPOZIO PRI -ATA/-ITA. Kovrilo de John Hartley. Stafeto: Movado, 2. J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1961. 338 (viii + 330)p. 22.5 × 15 cm. Prezo: 3 usonaj dolaroj.

LA OKCIDENTA ĈAMBRO. Bildoj de Van Šuhuj; teksto de Hong Zengling. Traduko de Laŭlum. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, Ĉinujo, 1961. 88p. 13 × 18 cm. Prezo: 0,75 gld. (3 steloj).

RAKONTOJ PRI FANTOM-SPITANTOJ. Kompilita de La Literatura Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1961. 98p. 18.5 × 12 cm. Prezo: 1,25 gld. (5 steloj).

KARPETOJ TRANSSALTIS LA DRAKPORDON. Bildoj de Jang Sanzi kaj Ding Jonĝin; teksto de Gin Gin. Traduko de T. H. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1961. 32p. 20 × 18 cm. Prezo ne montrita.

L. Mimó: PERFEKTECO DE LA ESPERANTAJ VERBOJ. Eld. en Sabadell-Barcelona, 1961. 57p. 24.5 × 17 cm. Prezo: 50 pesetoj (10 steloj).

NIA FORUMO

ANKORAŬ PRI LA LIBROJ

En la sama rubriko de novembra numero aperis du artikoloj: "Ĉu ni vere bezonas literaturon" de K. Mc Lennan kaj "Ĉu legas aŭ ne la esperantistaro?" de d-ro Kussinszky. Ambaŭ artikoloj traktas la saman problemon kaj ili instigis min skribi jenajn liniojn.

En la unua artikolo estas menciitaj du personoj, kiuj neniam estis informitaj ke en Esperanto ekzistas literaturo. Ni ĉiuj estas konsciaj ke la du menciitaj personoj ne estas hazarda ekzemplo, sed ĝi estas ĝenerala opinio de miloj kaj miloj da homoj interesiĝantaj pri literaturo. Ili apenaŭ scias ke Esperanto ekzistas, nenion pli.

Kaj kie ili povis informiĝi pri la internacia lingvo? Kie ili havis okazon vidi libron en Esperanto? Kiel ni kutimas agi? Kiel oni vendas kaj aĉetas E-librojn?

Por tiu ekstera publiko nur en librovendejoj kuŝonte sur bretaro kun aliaj nacilingvaj libroj, la libro en Esperanto akiros plenan egalrajtecon kun la aliaj. Tiam ne okazos, ke homoj kleraj esprimos tiajn opiniojn: "La celo kaj la idealo de Esperanto estas bonaj, sed ĝi ne havas literaturon". Tia opinio pri la internacia lingvo estas logika konkludo rezultinta el nuna situacio kaj la saman opinion havus ni ĉiuj, se ni hazarde ne fariĝis esperantistoj.

Diversmaniere ni aĉetas la librojn: oni mendas rekte de eldonisto, helpe de iu peranto aŭ libroservo, private, interŝanĝe aŭ simile. Kaj kia estas vojo de iu libro en nacia lingvo?

Simpla kaj natura: eldonisto — librovendejo — leganto. Kial ni ne organizu ion similan en kelkaj pli grandaj urboj, almenaŭ tie kie ni trovos favorajn cirkonstancojn?

"Ne eblas, stultaĵo, ni pereos, nia loka libroservo perdos procentojn, librovendistoj neniam akceptos tion, ili primokos vin, transpago de la mono en eksterlandon ne estas ebla, la eldonistoj de E-libroj estas kontraŭ, troa multekosteco ktp!" — estis argumentoj kontraŭ mia propono kontakti kun libroentrepreno. Tiaj argumentoj ne povis kontentigi min kaj kelkajn aliajn samideanojn en Zagrebo. Ni penis ion fari kaj ni sukcesis efektiviĝi ion similan.

Ni interkonsentis kun la respondeculoj de la plej granda Zagreba libroentrepreno kaj -vendejo, ke ili mendas je sia propra risko certan kvanton da libroj el eksterlando laŭ konsulto kun ni (po 2-5 ekzempleroj). Pluajn mendojn ili faros laŭ la postulo de merkato. La avantaĝoj de tiel farita interkonsento estas multaj kaj evidentaj:

— ĉiu libroaĉetanto facile kaj simple povas aĉeti deziratan libron en unu el la plej grandaj urbaj librovendejoj;

— librovendejo estas konstanta ekspoziciejo de niaj libroj por vasta neesperantista publiko;

— la librovendejo profitu procentojn, ĉar por la movado ĉiu vendita libro estas profito;

— la prezoj estas kelkfoje eĉ pli malaltaj ol en niaj libroservoj;

— per tio nuliĝas la problemo de nepagipoveco el Jugoslavio, ĉar la libroentrepreno disponas certan sumon de eksterlanda mono;

— ĉiu E-eldonisto ĉu en orientaj landoj, ĉu en la okcidentaj, ricevos koncernan valuton mem, anstataŭ librojn kiel ĝis nun por interŝanĝo.

Min ne surprizis la fakto ke ĉe "Jugoslovenska knjiga" en Beograd ne vendiĝis solaj 6 (ses!) ekzempleroj de la verko "Sekretoj de la marestaĵoj". Ankaŭ la libroj en la Zagreba librovendejo polvopleniĝos ie sur bretoj monatojn kaj semajnojn, ĉar nia samideanaro "obstine" bojkotas ĉion kio estas ekster nia fermita rondo pro stranga opinio: "Ĝi pereu! Neesperantistoj ne okupiĝu pri niaj aferoj! Ni 'esperantistoj' aĉetos librojn nur de niaj E-institucioj".

Eble ili pravas, ĉiu almenaŭ pripensu tion! Inĝ. Nedeljko Korasić

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la januaran numeron.

Radio Roma. 2-II, Grandaj sanktuloj: S-ta Bonaventura; 6-II, Tra la literaturo; 9-II, Leterkesto kaj bibliografio; 13-II, Novaĵoj el Italujo; 16-II, La poeto de la itala Relevo; G. Garducci; 20-II, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-II, Italaj belartaj urboj: Rimini; 27-II, Karnavalo en Italujo. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella.

Radio Sofia nun elsendas per ondoj 48.62 m. kaj 39.11 m. de 19.00 ĝis 19.25; per ondoj 30.93 m. kaj 25.32 m. de 22.30 ĝis 22.55.



Kursanoj de la trisemajna kurso en Zagreb. En la mezo sidas la kursgvidantino s-ino Emilija Lapenna



Oni dancas la sardanon "Sabadell Esperantista" (vd. sub "Hispanujo").

Ira la Mondo

Aŭstrujo

● **Esperanto en porinstruista seminario de Tirol.** Kiel en la pasintaj 6 jaroj ankaŭ ĉi-jare funkcias Esperanto-kurso en la porinstruista seminario de Innsbruck/Tirol. La kurso, kiun gvidas s-ano Hans Steiner el Wörgl, estas nunjare frekventata de 35 instruistaj gestudentoj el 17 lokoj de la lando. La instruista seminario de Innsbruck estas la sola en Aŭstrio, kiu jam en 1955 je iniciato de s-ano Hans Steiner enkondukis la Esperanto-instruadon sur libervola bazo.

Britujo

● **"Rotary", organo de la Rotario en Britujo** tre favore raportis, kun foto, pri la Junulara Kongreso en Wokingham, kie la loka Rotario akceptis kaj gastigis la kongresanojn en la Urbdomo.

Danlando

● **S-ro Eskil Svane el Kopenhago**, kunfondinto de la U.N. Esperanto-Klubo, ĵus fariĝis Magistro pri Kompara Jurscienco ĉe New York University rezulte de sia disertaĵo "La farado de kontraktoj — en dana kaj usona juro". La disertaĵo estas skribita en la angla lingvo — kun resumo en la lingvo internacia.

Francujo

● **Prelegoj de S-ro Llech Walter en Hispanujo.** Invitita de la Esperanto-Grupo Moyà kaj de "Lingua Club" de Manresa (Hispana Katalunio), la Prezidanto de Unuiĝo Esperantista Franca, sinjoro René Llech-Walter, sukcese prelegis en ambaŭ menciitaj urboj pri la temoj "De la nebuloj de Nederlando al la suno de Rusiljono" kaj "Turismoj aspektoj de Rusiljono", kun projekcio de kolorbildo. La 23an Novembro en Moyà S-ro Llech-Walter prelegis esperantlingve kaj la U.E.A.

ĉefdelegito por Hispanujo, S-ro Ramon Molera, tradukis al la kataluna lingvo por la neesperantistoj. En Manresa, okazis du prelegoj: franclingve la 24an Novembro, por la lernantoj de franca lingvo de "Lingua Club" kaj la sekvantan tagon, esperantlingve. Eĉ la franclingva prelego estis okazo de trafa propagando poresperanta, ĉar interalie la prelegisto priskribis la etoson de niaj Universalaj Kongresoj kaj de la Esperantista Kulturdomo de Grésillon, kio vekis tre grandan intereson ĉe la aŭskultantaro. Ĉar "Lingua Club" ampleksas plurajn lingvajn fakojn, interalie la Esperantan, estas antaŭvideble ke pluraj aŭskultintoj sekvos esperantan kurson.

Rotary-Klubo kaj Esperanto. Por konigi Esperanton en internacia "Rotary-Club". Nun nia samideano S-ro Duchemin, Usine Pont-du-Roux, Saint-Bonnet-Chastel (Puy-de-Dôme) Francujo, faras larĝan kaj efikan propagandon en Internacia "Rotary-Club". Ja tia universala kaj grava societo nepre devas esti sciigata pri la utileco kaj tutmonda disvastiĝo de nia lingvo. Simpla poŝtkarto sendita de alilandaj samideanoj al S-ro Duchemin por lin gratuli certe helpus lin kaj estus utiligata de li por pruvi tiun disvastigon de Esperanto.

● **Kultura Semajno Pasko 1962, Kastelo de Grésillon, Francujo.** Sub la aŭspicio de la Franca Ministerio de Edukado okazos de la 16a ĝis la 23a de Aprilo 1962 kultura semajno sekvota de la Nacia Kongreso de U.E.F. S-ino Cheverry, Dr Albault, Soj Babin, Frangeul, Guillaume, Llech-Walter, Micard, Motillon, Ribot, Rousseau, Rougetet, Thierry, Waringhien, prelegos en esperanto pri diversaj Kulturaj temoj. Petu informojn de S-ro Micard, instruisto, Epineux le Seguin (Mayenne) Francujo.

● **Les Andelys.** La loka Esperanto-klubo celebris la Zamenhof-tagon la

17-an de decembro posttagmeze en la ludoĉambro de la porknabina elementa lernejo. La junaj membroj de la progresiga kurso partoprenis konkurson kies temo estis: "La plej bela letero al la korespondanto". Post longa diskutado, la juĝantaro elektis la leteron de Josette Caron, 12-jara, kiu gajnis kiel premion "Bildlibro pri Bestoj". Estis prezentitaj tri kolorfilmoj pri Danlando, prunteprenitaj el la ambasadejo. Ĉeestis proksimume 70 personoj, inter ili la prezidanto de la Normanda Esperanto Unuiĝo, la estro de la loka gimnazio kaj la estrino de la porknabina lernejo.

● **Sub titolo "La Malédiction de Babel"** aperis en "La Dépêche" (Tuluza) artikolo pri Esperanto de la fama tuluza kuracisto D-ro Viovenel, ano de la Tuluza Esperanto-Societo kaj fama verkisto (22 volumoj pri psikologio, filozofio, k.a.), prelegisto kaj artikolisto.

Hispanujo

● **Tuttaga Esperanto-festo** sukcese okazis en Sabadell la 1-an de oktobro. Prelegis Akad, Delfi Dalmau. Estis aranĝita sardano-koncerto dum kiu debute oni ludis la sardanon "Sabadell Esperantista", speciale verkitan de la loka muzik-profesoro Josep Maria Llorens. La feston finis bankedo kun interurba esp. forumo samtempe transprenita sur sonbendon. Ĵurnalo kaj radiostacio urbaj ofte aludis la eventon. Manprogramojn pri la E-kursoj oni distribuis abunde.

Jugoslavio

● **En novembro la zagreba societo "Bude Borjan"** organizis eksperimentecle trisemajnan elementan kurson. Aliĝis 13 kursanoj, el kiuj du forfalis, aliaj finis la kurson kun kontentiga rezultato. La lecionhoroj estis ĉiutagaj duhoraj, krom sabato kaj dimanĉo. La kursanoj havis tridek lecion-horojn, kio estas la normala

kvanto en trimonataj kursoj. La eksperimento liveris utilan sperton, ke tiaj "ekspresaj" kursoj estas eblaj kaj tre harmoniaj al la hasteca etoso de nia tempo. La gvidantino de la konversacia kurso, kiu transprenis ĉiujn kursanojn el la trisemajna kurso, estas kontenta pro ilia scio.

● **Esperanto kaj I.O.O.F.** Por ekzameni kion ni kune povos atingi por Esperanto en nia Independent Order of Odd-Fellow's, mi urĝe petas al la Esperantistoj-Membroj de I.O.O.F., sciigi al mi siajn nomojn kaj adresojn. Kun indiko, ĉu vi intencos partopreni la U.K. en Kopenhago. Volonte mi faros eventualajn preparajn laborojn. Sed almenaŭ mi petas ĉiujn adresojn por ke ni povu interkontakti en la intereso de nia por-Esperanto laboro en I.O.O.F. P. Korte, Prins Bernhardlaan 19, Veendam (Nederlando).

Usono

● **Esperanto-kurso gvidata de Donald W. Hoffman**, ekkomencis la printempon 1961 en la ĝeneralaj oficejoj de la New Jersey Bell Telephone Co. en Newark, New Jersey. Sep studentoj, gelaborantoj en la firmo, ĝuis interesan dek-semajnan kurson por Esperanto-komencantoj. S-ro Chaonshik Choi, studanto ĉe Columbia Universitato kaj tradukanto de Koreo kaj Japanaj lingvoj por la Usona registaro, parolis antaŭ la klaso — bonega kontakto inter la Okcidento kaj la Oriento per Esperanto. La aŭtuna klaso allogis 14 novajn interesulojn kaj la entuziasmo por Esperanto kaj renkontiĝoj kun alilandanoj multe motivigas aliajn laborantojn de la firmo serioze pripensi partoprenadon en la vastaj kaj inspiraj aktivecoj de la Esperantomovado.



La ludantaro pri korbopilkludo en Madrida Esperanto-Klubo. Tiuj ludantoj, same kiel tiuj de ŝako, apartenas al la respektivaj Federacioj de Korbopilklubo kaj ŝaka, kaj la rezultoj de iliaj partioj aperas ĉiusemajne en la gazetaro.

ESPERANTISTA VIVO

Geedziĝo

Minnaja-Pizziolo. La 23an de decembro 1961 geedziĝis en Pisa, Italujo, s-ro Nicola Minnaja, tre konata denaska esperantisto kaj plurfoje gajninto en la Oratoraj Konkursoj de UEA, kaj f-ino Fiorella Pizziolo (Via Vespucci 71, Pisa). Ni deziras al ili grandan feliĉon.

NEKROLOGO

Baranyai. La 1-an de decembro mortis en sia 59a jaro s-ano Emeriko Baranyai (Emba), la tre konata esperantista poeto kaj romanisto, kies verkoj inkluzivas "La profeto" (1934), "Maria kaj la grupo" (1936), kaj "En ekzilo" (1938). La enterigon ĉeestis multaj esperantistoj, kaj Julio Baghy faris la funebran parolon.

Fischer. La 2an de oktobro mortis en Bern s-ino Hanni Fischer-Buri en la aĝo de 67 jaroj. S-ino Fischer lernis Esperanton en 1939, kaj dediĉis siajn lastajn jarojn tute al la movado. Ŝi fondis la Svisan Esperanto-Instituton, kreis valorajn kontaktojn kun politikistoj, kaj kreis la fundamenton por la kursoj en Münchenwiler.

Jacobs. La 15an de decembro 1961 mortis pro memnekulpa aŭtoakcidento Peter Jacobs, 18-jara, studento de farmacio ĉe la ŝtatuniversitato de Gent (Belgujo), sola nepo de gesinjoroj, geĵubileantoj de Esperanto, Jan Jacobs-Van der Stegen, Boomsesteegweg 444, Antwerpen.

Mittelholzer. En junio 1961 mortis s-ino Yda Mittelholzer, del. de UEA en Uzwil, Svislando, je la aĝo de 62.

Nuidan. Unu el la Honoraj Prezidantoj de la Fededacio Bourgogne, Francujo, s-ro Auguste Nuidan, forpasis la 9an de decembro 1961 en Savigny-les-Beaune (Côte-d'Or), en sia 89a jaro.



Ĉe la XXXII Itala Kongreso de Esperanto, okazinta en Sanremo (septembron 1961-an): la Urbestro de Sanremo, la Prezidanto de Itala Esperanto Federacio, adv. s-ano A. Barbiellini Amidei kaj prof-ro G. Caraffa, organizanto de la Kongreso. (foto I. O./IEF)



47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4-11 Aŭgusto 1962

Sub la Alta Protektado de la Dana Ĉefministro Viggo Kampmann.

Konstanta Adreso: ĉe Universala Esperanto-Asocio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

No. 4 Rotterdam, la 1-an de jan. 1962
Honora Komitato

Eniris la Honoran Komitaton: Gustav Pedersen, Prezidanto de la dana Parlamento; K. Helveg Petersen, Ministro pri Instruado; J. O. Krag, Ministro pri Eksterlandaj Aferoj; Prof. D-ro Niels Bohr, Nobelpremiito pri fiziko; Grafo C. A. C. Moltke, Prefekto de Kopenhago; Ove Weikop, Urbestro de Kopenhago; Sigvald Hellberg, Prezidanto de la urba konsilantaro de Kopenhago; Kr. Thomsen Jensen, Direktoro de la lernejoj en Kopenhago; Hans Sølvhøj, Ĝeneraldirektoro de la Dana Radio; P. E. N. Skov, Ĝeneraldirektoro de la Danaj Ŝtatfervojoj; Gunnar Pedersen K., Ĝeneraldirektoro de la Poŝto kaj Telegrafo; Sven Acker, Turistĉefo.

Scienca Konferenco

Sub la aŭspicio kaj en la kadro de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago la Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj. La celo de tiu ĉi konferenco estas studi la lingvan problemon en la scienco. Al tiu Konferenco rajtas partopreni kvalifikitaj sciencistoj (ankaŭ neesperantistaj) ĉu persone ĉu per skriba kontribuo. Por pliaj informoj la interesiĝintoj turnu sin al la Centra Oficejo de U.E.A. aŭ rekte al la Prezidanto de la Organiza Komitato de la 1-a I.K.E.S., D-ro P. Neergaard, Gothersgade 158, København-K., Danlando.

Oratora Konkurso

La Estraro de UEA decidis pri la jenaj temoj : 1. Morala respondeco de sciencistoj; 2. Ĉu internaciismo progresas aŭ malprogresas?; 3. La influo de la junularo en la mondaferoj; 4. Etikaj valoroj el vidpunkto de la nuntempa junularo; 5. Kial sporto?

La Oratoran Konkurson rajtas partopreni gejunuloj ĝis 28-jaraj, aliĝintaj al la 47-a Universala Kongreso. La unua premio estos 150 ned. gld., la dua premio 100 ned. gld. kaj la tria premio 50 ned. gld. Krom tio estos eventualaj konsolaj premioj sub formo de libroj. La nomo de la unua gajninto estos engravurita sur la arĝentan "Pokalon Ivo Lapenna". La interesiĝintoj estas petataj sin anonci



La "babilejo" de la 47a Universala Kongreso

ĉe la Centra Oficejo de UEA aŭ en la Kongreso mem.

Princino de la Balo

Dum la Oficiala Balo estos elektita la "Princino de la Balo". Ĉiuj kongresaninoj ĝis 30-jaraj rajtas partopreni.

Bankedo

Dum la Kongreso okazos festa Bankedo en la luksa Moltkes-Palaco. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Statistiko (ĝis fino de decembro) :

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 4,

Belgujo 12, Brazilo 4, Britujo 106, Bulgarujo 5, Danlando 175, Finnlando 31, Francujo 64, Germanujo 67, Grekujo 2, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Irlando 1, Islando 2, Israelo 2, Italujo 30, Japanujo 5, Jugoslavio 11, Katario 1, Libano 1, Madagaskaro 1, Nederlando 57, Norvegujo 2, Nov-Zelando 1, Pollando 12, Portugalujo 6, Svedujo 106, Svisujo 9, Usono 8. Entute 730 el 31 landoj. (Pasintjare 586).

Konstanta Kongresa Sekretario
G. G. Pompilio

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de januaro 1962

N-ro 345

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de decembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de decembro 1960.

Individuaj membroj

	1960	1961
Asociaj membroj	22505	23099
MJ	852	847
MA	5073	5261
MS	569	484
Pat.	5	2
DM	388	418
HM	43	43
J-MJ	31	32
J-MA	192	170
	7153	7257
	29685	30356

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Wels (Ober-Österreich) D : vakas.

Ĉeĥoslovakio

Olomouc (Morava) D : vakas.

FD : (Geografio, arĥeologio, paleontologio) : vakas.

FD (Teatro) : vakas

Nederlando

Amsterdam FD (Fiziko) : vakas.

Hago FD (Elektro-Tekniko) : vakas.

VD : vakas.

Groningen FD (Muziko) : vakas

Krommenie (Noord-Holland) D : vakas.

Leeuwarden (Friesland) FD (Arĥitektura) : vakas.

Millingen (Gelderland) D : vakas.

Sovet-Unio

Leningrad Rossijskaja SFSR) VD : vakas.

SVEDUJO

Brovallen (Dalerna) D : vakas

Skövde (Västergötland) JD : vakas.

Umeå (Västerbotten) FD (Amatorradio) : vakas.

USONO

Bozeman (Montana) FD (Speciala Edukado je personoj korpe malhelpataj) : vakas.

Greenfield (Massachusetts) JD : vakas.

Springfield (Massachusetts) D : vakas.
FD (Edukado) : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Lønblad, F-ino R., Faarup, Danlando.
Tortel, S-ino R., Nyons, Francujo.
Weigelt, F-ino G., Bern, Svislando.
Wenger, D-ro A., Neuchâtel, Svislando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

477. Azam, S-ro L., Tananarive, Madagaskaro; 478. Hug, S-ro R., Casablanca, Maroko; 479. Duncan, S-ro T., Brookline, Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

48. Rönmark, S-ro K., Skönsberg, 49. Sjöblom, S-ro S., Malmö, 50. Svärd, S-ino R., Borås, 51. Syrjämäka, S-ro M., Borås, 52. Törelöv, S-ro G., Kristinehamn, 53. Turner, S-ro F., Linköping, 54. Westman, S-ro A., Björna, Svedujo; 55. Ammann, S-ro K., Solothurn, 56. Baur, D-ro A., Liebefeld, 57. Bouvier, S-ro P., Genève, 58. De Sassi, S-ro M., Zürich, 59. Hohl, S-ro J., Flims-Dorf, 60. Jayet, F-ino E., Paquis, Svisujo; 61. Heilberg, S-ro A., San Francisco, 62. Heilberg, S-ino E. O., San Francisco, Usono. 63. Banham, F. R., Victoria, 64. Taylor, S-ro F. V., Canterbury, Aŭstralio; 65. Pich, S-ro J., Kaltenleutgeben, Aŭstrujo; 66. Couwenberg, S-ro Fr., Blankenberge, Belgujo; 67. Bluett, S-ro T. L. C., Truro, 68. Boatman, S-ro D. P., Westcliff-on-Sea, 69. Clarke, S-ro W., Dunfermline, 70. Dunbar, S-ro R., London, 71. Gregor, S-ro D. B., Northampton, 72. Kennedy, S-ino M., Bishop Ruckland, Durham, 73. Kennedy, F-ino M., Glasgow, 74. Lewin, S-ro M., Dunstable, 75. Miller, S-ro J. R., Stone.

DONACOJ AL INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro U. J. Moritz, 4,50 gld., D-ro J. L. Tortel, 7,30 gld., S-ro R. Tabernat, 36,50 gld., S-ro M. Ehbauer, 10,10 gld., S-ro P. Lauffen, 4,— gld., F-ino C. Douma, 3,50 gld., F-ino L. Adelaar, 3,50 gld., S-ro M. van Aelst, 7,55 gld., D-ro G. Maillard, 36,50 gld., S-ro A. Broise, 7,30 gld., S-ro M. Schirber, 14,60 gld., S-ro A. Ribot, 7,30 gld., S-ro R. Debernardi, 3,65, S-ro P. Marly, 7,30 gld., S-ro M. Massemin, 3,65 gld., S-ro M. Retot, 7,30, S-ro J. Tuffier, 3,65

En kunligo kun eventuala plilarĝigo de la librofako de U.E.A.

la Centra Oficejo alvokas interesitojn

por la posteno de

oficisto speciale por la LIBROSERVO

Fakaj scioj pri librokomerco signifas rekomendon.

Leteroj kun detalaj informoj pri instruiteco, antaŭaj postenoj kaj referencoj bonvolu sendi al F-ino M. H. Vermaas, Direktorino de la C.O., Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando.

gld., F-ino S. de Weerd, 7,20 gld., S-ino E. Smith, 3,65 gld., el Usono, Nekonata, 36,— gld., S-ro F. Jelenc 36,50 gld., S-ro F. Mueller-Sorau, 10,10 gld.

La donacojn por la aliaj fondaĵoj ni publikigos en la marta numero.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

Direktorino C.O.

M. H. Vermaas,

DANKON PRO NOVJAR-SALUTOJ

En la jarfinaj semajnoj, kaj ankaŭ pli poste ankoraŭ, alvenis grandega nombro da bondeziroj okaze de la festotagoj kaj la Nova Jaro al la Centro Oficejo en Rotterdam kaj al la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono. Kun granda plezuro ni akceptas tiujn esprimojn de simpatio kaj amikeco. Ni plej kore kaj sincere reciprokas al ĉiuj la bondezirojn. Ke vi ĉiuj havu sukceson en via laboro, ke ĉiuj havu forton kaj energion por maksimume streĉi sin precipe por la nuna granda kampanjo por laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn kiu, laŭ la nuna stato, havas tre favoran prognozon.

Honora Direktoro de C.E.D.

Prof. D-ro I. Lapenna,

M. H. Vermaas,

Direktorino C.O.

KONKURSO PRI AFIŜOJ

En Harrogate estis aranĝita ekspozicio kaj konkurso pri propagandaj afiŝoj koncerne la Internacian lingvon. Sur paĝo 151 de la septembra numero 1961 de la revuo Esperanto estis montrite, ke granda nombro da projektoj estis sendita por tiu celo.

Kiel estis anoncite sur la sama paĝo, la decido ne povis esti farita en Harrogate. Ni povas informi ĉiujn partoprenintojn, ke ĉiuj projektoj troviĝas en la Centra Oficejo en Rotterdam kaj ke ankoraŭ oni traktas kun la presisto, ĉar ekzistas grandaj teknikaj kaj financaj problemoj pri la realigo de iuj projektoj. Antaŭvideble, la definitiva decido estos farita dum la printempa Estrarkunsido de UEA. La partoprenintoj do bonvolu havi ankoraŭ iom da pacienco.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

AVERTO! Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

La Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M. 12, rue des Jacobins, Clermont-Fd (PdD) Francujo) peras adresojn inter Esperantistoj, kiuj serĉas korespondantojn. Bonvolu preslitere skribi viajn nomon, antaŭnomon, kompletan adreson kaj aldoni detalajn informojn pri aĝo, profesio, ĉefaj interesoj ktp. por faciligi la plenumadon de viaj deziroj. Ĉiuj korespondemuloj rajtas senpage enskribiĝi, tamen ne povas postuli rektan respondon de la korespondservo. Iliaj adresoj estas transdonataj al uzantoj, kiuj aldonis respondkuponon (aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn) por rekta respondo. La regularo pri KSM aperis en la jarlibro 1962-a, je la paĝo 105a. Bonvolu atenti, ke KSM peras nur adresojn kaj preterlasas ĉiujn petojn, kiuj enhavas proponojn pri ia ajn negoco.

Por pri-Esperanta parolado al farmjunuloj, februaro 14-an, agronomoj sendu informsalutojn tuj. Fraser, 2 Lady Helen Street, Kirkcaldy, Skotlando.

Ni atendas salutkartojn el tuta mondo por nia februara letervespero. Aŭfranku filatele. Garantiata respondo. Groupe Espérantiste, Café Escargot, place

d'Armes, Valenciennes (Nord) Francujo.

Belan frontispicon havas "William Penn", majstra prelego de Prof. E. Privat pri paca pioniro. 4 rpk. aŭ steloj. Kvakera Esperantista Societo, 5 Cotham Park North, Bristol 6, Anglujo.

Amase! Subite! Sendu sanigilojn, kovrilojn, vestaĵojn, ŝuojn kaj manĝaĵojn al Ruĝa Alĝeria Lunfalĉilo, Rue de Serbie, Tunis.

Ghizela Ĝigi Harabaĝiu okaze de la nova jaro bondeziras kaj samtempe dankas al gesinjoroj: Elfriede Ernst, P. H. Mooij, René-Rose Jacobs, Lemoine, Oleffe, Haller, Grimberg (Belgujo); Baarslag, Pragano (Nederlando); Prager (Francujo); pastro Jacobitti, Minnaja, Topi, Barbieri, Conte Fontanive, Terrazzani (Italujo); kiuj per diversaj afablaĵoj helpis ŝin dum ŝia lasta vojaĝo. Ŝia nuna adreso estas: ĉe Esperanto-Domo, Via del Boccaccio 5, Roma, Italia.

Esperanto-Civito. Statistikoj (ciferoj ĝis fino de 1960 inter krampoj por komparo): Dovra Klubo 8 (4); E-Civitanoj 3 (3); interesatoj 48 (21); donacintoj 18 (6); vizitintoj 16 (3); anoncetoj 32 (16); fonduso 1730 (720) steloj. Kiu estos la kvara civitano? — D. Soleo, 14b Castle Avenue, Dover, Britujo.

Grava projekto en Usonaj Lernejoj! (Vidu artikolon kaj foton). TUJ sendu salutkartojn, broŝ., ktp. por granda ekspozicio en Februaro antaŭ publiko kaj precipe lernejoj fakuloj. D-ro Edwin Feldman, lernejestro, Lawrence School, San Mateo, Calif., Usono.

LASTMOMENTAJ NOVAĴOJ

PLIFORTIGO DE LA KONSULTAJ RILATOJ KUN UNESKO

Laŭ la ĵus ricevita informo, la Plenuma Komitato de UNESKO decidis dum sia lasta Sesio envicigi U.E.A. en kategorion de "Informado kaj Konsultaj Rilatoj" (kategorio B) laŭ la novaj Direktivoj Koncerne la Rilatojn de UNESKO kun Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj. La organizaĵoj de kategorio A (formitaj de UNESKO mem) kaj B (la plej gravaj privataj internaciaj organizaĵoj) ĝuas konsiderindajn avantaĝojn kompare kun la organizaĵoj de kategorio C (malpli gravaj internaciaj organizaĵoj en informaj rilatoj kun UNESKO) kaj la ceteraj organizaĵoj, ekster kiu ajn kategorio, kun kiuj UNESKO povas havi nur neformalajn rilatojn. La nova pozicio estas rezulto de efika kunlaborado de UEA kun UNESKO ekde 1954 kaj promesoplena por plua kunlaborado kaj por la fortikigo de la pozicioj de UEA en la mondo.

HAMBURGA ĈAMBRO

Jen venis la dua donaco de 5000.— gld por aparta ĉambro en la nova domo de U.E.A. Kontraŭe al la unua, kiu venis de tute nova esperantistino, tiu ĉi dua venis de unu el la plej malnovaj veteranoj, nome de Sinjoro Felix Epstein, Hamburgo, Germanujo, kiu skribis, ke per tio li deziras i.a. "esprimi mian profundan dankon pro tio, ke la Zamenhofa ideo jam antaŭ 56 jaroj donis al mia vivo tiom eminentan, ne sufiĉe alte takseblan enhavon kaj celon...." S-ro Epstein deziras, ke dum lia vivo la ĉambro portu la nomon de la urbo Hamburgo kaj poste la lian. Li aldonis: "Grandega estus mia ĝojo, se mia faro instigus kelkajn aliajn samideanojn al imito". Plej koran kaj sinceran dankon al Sinjoro Epstein pro lia malavara kaj grandanima gesto!

GRAVA ATENTIGO

Pro la nuna eksterordinara situacio en la Centra Oficejo, kaŭzita de la aranĝado de la nova domo kaj baldaŭ okazonta translokiĝo, neeviteble estiĝis prokrasto en la plenumado de pluraj taskoj kaj precipe en la korespondado. Ni petas indulgon kaj paciencon de tiuj, kiuj atendas respondon. Ni esperas baldaŭ ĝisdatigi la aferojn.

Dir. C.O.

Gesamideanoj en nepagipovaj landoj sendu unufoje al mi bele afrankitan bildkarton aŭ legitan Esperanto-gazeton el via lando por mia Esperanto-varbkolekto. (Politikajn revuojn ne sendu). Se via sendaĵo atingos min ĝis la 2-a de Junio 1962, eble vi gajnos unu por vi de mi pagitan kotizon ĉe U.E.A. (membrecon kun jarlibro 1962, sen revuo). Mi fordonacos 15 pagitajn kotizojn; la jarlibron vi ricevos rekte de U.E.A., se vi estos inter la gajnintoj. Unufoja respondo al ĉiuj certe! Skribu vian adreson bone legebla! Mia adreso estas Adalbert Masuhr (24 b) ELMSHORN, Hainholz 43, Germanujo.

VERDA STELO

Tute nova vilao en la pinarbaro de Punta Marina (Ravenna) ĉe la adriatika marbordo. Lueblaj apartamentoj de majo ĝis septembro dum 2, 3, 4 semajnoj kun 3, 4, 5 litoj po ĉiu. Enirejo, kuirejo, banejo sendependaj.

Posedanto: Bagnoli rag. Stefano. UEA-FD.

Via Ravegnana 152 - Ravenna

tel. 25670

(ITALIO)

MODERNA NATURISMO

Por honestemaj pensuloj

Informoj ĉe: INFE-sekretario Leif Heilberg, 1801 Page, San Francisco 17, Calif., Usono.

Jam kvin jarojn aperas la riĉe ilustrita


NUNTEMPA BULGARIO

monata kultura revuo en Esperanto. Paĝoj 48 (ok el ili kororaj) krom la kovriloj. Formato 21/27.

Abonprezo 1,5 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro en nacia mono.

Rapidu aboni por la sesa jaro, ĉar la eldonkvanto estas limigita.

Adreso: Nuntempa Bulgario, Levski 1, Sofio, Bulgario.



FARIĜU AGENTO EN VIA URBO

Pargeteroj

Se vi deziras plibonigi vian financon en malmultaj tagoj, esploru ĉu tiu produktaĵo jam ekzistas en via urbo. Per la ĉi-supra desegnaĵo, vi formas ideon.

PARGETEROJ

GARANTIO KAJ MONPROFITO

Per unu sola tipo oni faras 15 desegnaĵojn. Eksterordinara produktaĵo, stilo kaj beleco, minimuma certa profito de 100%, facilega fabrikado. Ne estas necese, ke vi estu fakulo. Petu detalojn kaj traduku ilin en vian lingvon. Fariĝu industriisto aŭ instruisto iun, kiu posedas almenaŭ pargetfaran maŝinon.

Vi, samideano, povos almenaŭ esti nia agento en via urbo.

Kaj memoru: nur per Esperanto ni sukcesos esprimi niajn pensojn en iu ajn mondparto.

Adreso: Geraldo L. Galvão, Rua Frei Caneca, 155, Rio de Janeiro, Guanabara, Brazilo.

BENELUKSA KONGRESO 1962

HAGO – NEDERLANDO

9 - 10 - 11 junio
en konferencejo

OVERVOORDE

belege situanta en rava parko apud Hago

El la elstara programo:

Inaŭgura parolado de ned. parlamentano-esperantisto K. v. Rijckevorsel;
Prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna, Ĝen. Sekr. de UEA kaj Direktoro de C.E.D., pri *"La Junularo en la Postmilita Tempo"*;

Prelegeto de S-ino Ljuba Lapenna, Sekr.ino de C.E.D., pri *"Malantaŭ la fasado de C.E.D."*;
Bankedo, Balo, Ekskursoj, Amuzaĵoj

Kotizo ĝis 15.4.'62: 12,50 gld (50 steloj);
poste: 15.— gld (60 steloj).

ALIGU TUJ! Petu informojn ĉe S-ino I. J. M. Dijkhoff, Sekr.ino L. K. K., Van Trigtstraat 20, DEN HAAG, Nederlando.

AL ĈIU ESPERANTISTO : PROSPERIGAN NOVAN JARON !

Pro multokupiteco kaj tro ofta vojaĝado, mi devas sciigi je mia granda bedaŭro la informpetintojn ke mi — kontraŭvole — ne havas la tempon korespondi.

Ankaŭ la Esperanto movado en Hongkong ankoraŭ estas en embria stato kaj sekve ne ankoraŭ troviĝas korespondantoj en Hongkong.

Al seriozaj informpetantoj mi certe daŭrigos mian laŭeble devon kiel delegito.

Bonvolu noti adresŝanĝon:

Dirk M. Brink

Oficejo:

203 Shell House

Hongkong

Tel.: 23936

Telegramadreso: ESPERANTO HONGKONG

Hejme:

49-A, Shouson Hill Rd.

Hongkong

Tel.: 92248

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Belega fotolibro kun teksto en Esperanto.
Eldonis **BRUNA**, Nederlando.

Sur kvin kontinentoj infanoj estas ĉarmegaj en siaj ĝojoj, ĉagrenoj, ludo kaj laboro. Konvinkiĝu mem!

Prezo:

2,95 gld.

(11.80 steloj)

**MENDU ĈE
U.E.A.**

